

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

BEA 80-JARA

•

BONVENON
EN VARSOVIO!

•

LA ETERNA
KVERKO

•

HEROLDO
DE NOBLAJ IDEOJ

•

BULGARA
E-POEZIO

•

INTERNACIA
METODIKA
SEMINARIO

•


SVEDAJ INFANOJ
EN IEK

•

GDREA —
KONFERENCO

80

BEA



La Palaco de Kulturo kaj Scienco — kongresejo de la 72-a UK de Esperanto — Varsovio'87.

72a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

25 jul. — 1 aŭg. 1987
Varsovio, Pollando



Bonvenon al la lulilo de nia lingvo!

Estimataj! Jen realiĝas la granda revo de la tutmonda esperantistaro kongresi en Varsovio, kongresi en la urbo, kiu antaŭ unu jarcento farigis la lulilo de la Internacia Lingvo. Sed Varsovio ne estas nur la urbo, en kiu Ludoviko Zamenhof aperigis la Unuan Libron. Ĝi estas la urbo, en kiu la lingvo de Doktoro Esperanto ricevis siajn unuajn vivimpulsosojn, en kiu naskiĝis la unuaj esperantaj literaturaĵoj, kreiĝis projektoj de gravaj dokumentoj, en kiu la juneta Antoni Grabowski por la unua fojo interparolis en la Lingvo Internacia kun ties kreinto d-ro Zamenhof. Varsovio estas la urbo, en kiu vivis kaj laboris niaj elstaraj pioniroj: Leo Belmont, Adam Zakrzewski, Józef Waśniewski, Aleksander Brzostowski, Leon Zamenhof kaj Kazimierz Bein (Kabe), per kies fortostreĉoj kaj oferema laboro kreiĝis firma bazo por la iom-post-ioma disvastiĝo de la Internacia Lingvo tra la mondo.

La 72-a UK en 1987 estos la tria Universala Kongreso en la pola ĉefurbo, post tiuj en 1937 kaj 1959. La partoprenintoj en la antaŭaj kongresoj havos la okazon por rememoroj, la novaj generacioj — la eblecon konatigi kun la pola ĉefurbo en ĝia nuna evolustato, post la grandega postmilita rekonstrua laboro. Bedaŭrinde vi ne plu trovos en nia ĉefurbo la detruitajn dum la Dua Mondmilito domon de Zamenhof, vi ne plu trovos la interesegajn E-arkivejojn, kiujn neniigis la militaj flamoj. Tamen plu restis la mirakle saviĝinta tombo de Ludoviko Zamenhof, ĉe kiu vi povos omaĝi la memoron de la Granda Filo de la Homaro — kiel d-ron Zamenhof nomis Unesko en 1959.

Al tiu Varsovio de la pioniroj de la E-movado, grava kultura kaj industria centro de Pollando, mi havas la honoron inviti vin en la nomo de la pola esperantistaro, por komune celebri la Centjaran Jubileon de Esperanto. Estu bonvenaj en Varsovio!

Stanisław ŚWISTAK,
prezidanto de LKK



LA ETERNA KVERKO

ĤRISTO GOROV,
prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio

Esperanto venis en nian landon per la rusa lernolibro jam en 1887 — tuj post la apero de la Lingvo Internacia.

La unuaj bulgaraj esperantistoj ellernis kaj uzis la lingvon kaj estis sagacaj batalantoj. Jen iliaj nomoj: Miloslav Bogdanov, Ĥristo Popov, Nikola Kovačev, Georgi Oreškov, Krăstjo Mirski, Georgi Atanasov, Georgi Aktarĝiev, Ĥristo Rjaĥovski, Simeon Petkov, Petăr Jordanov, Georgi Genov, Georgi Nikolov, Petăr Spasov, Georgi Zografski, Penko Petrov, Kiril Bogotinov.

Tiuj ĉi veteranoj kuraĝe kaj senlace, malgraŭ la mokadoj kaj insultoj, elverŝadis semojn sur la bulgaran teron — firme kredante, ke venos pli riĉa rikolto. Al tiutempaj apostoloj dediĉis jenajn versojn d-ro L. L. Zamenhof:

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l'tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
Ni semas kaj semas konstante.

En 1907 sur la fekunda bulgara tero elkreskis juna verda kverko: Bulgara Esperantista Ligo, poste asocio.

Sekvis nova generacio, kiu same dediĉis sian vivon al Esperanto: Ivan Krestanov, Atanas D. Atanasov (ADA), Stefan Minkov, Nikolaj Evstifejev (ruso), D-ro Panajot Ĥitrov, Ivan Dobrev, Panajot Kolev, Maleŝko Siŝkov, Dimităr Malčev, Penko Stoev, Ĥaralampi Bačvarov, Petăr Pamporov, Petăr Toŝkov, Stefan Hesapčiev.

En 1920 elkreskis esperantaj laboristaj rondetoj, kaj en 1922 — komunista grupo „Balkana Liberiga Stelo“ (dank' al P. Kolev, M. Siŝkov, Angel Nikolov — Angelo).

Tiu ĉi dua generacio verkis lernolibrojn kaj vortarojn, tradukis perlojn el la bulgara poezio

kaj prozo. La krono de la kverko estiĝis pli impona, pli potenca. Kaj ĝiaj folioj flustris kanton:

Agordu la brustojn, ho nia fratar',
por nova pli vigla jam kanto!
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
anoncu al ĉiu dormanto:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
la ombroj de nokto forkuras el mond'!

Antoni Grabowski

Post la Unua Mondmilito venis la tria generacio. Elkreskis nova potenca branĉo: Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA, 1930).

Jen ĝiaj agantoj: Simeon Petrov, Angel Petkov — Angelo, Trajana Petkova, Tinka Lakova, Atanas Lakov, Nikola Aleksiev, Ĥristo Kozlev, Asen Grigorov, Ĥristo Gorov, Todor Sofroniev, Ivan Keremidčiev, Dimităr Zlatarski, Kostadin Ciĉanov, Stojan Kostadinov, Krăstjo Karucin, Ĥristo Kanev, Nano Nanov, Vasil Cočov.

Ilia ĉefa merito: propagando de Esperanto inter la plej potenca kaj perspektiva klaso — la proletaro.

Kamarada kanto sonu,
kanto de l' Labor'...

Georgi Kirkov

Alternas la generacioj, post la fino de la Dua Mondmilito venis plua nova generacio — multnombra kaj respektoplena al la antaŭaj generacioj. Kaj la krono de la verda kverko estiĝis pli bela, pli juna, pli alloga, pli majesta.

Tiu ĉi kvara generacio lernas el la virtoj de la pioniroj: fidele sekvas iliajn moralajn principojn, admiras iliajn meritojn, sindone servas al sia socialisma patrolando.

La novaj kaj malnovaj generacioj laboras kun la kredo de la sovetia poeto Nikolaj Nekrasov:

Kredas ni, ke baldaŭ tempo venos,
la homaro plene nin komprenos...

„ESPERANTO POSEDAS MULTAJN VALOROJN...”

Interparolo kun ROMAN MALINOWSKI,
Prezidanto de la Pola Parlamento,
Alta protektanto de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto



— Sinjoro prezidanto, kio kaŭzis, ke vi akceptis esti la honora protektanto de la 72-a Universala Kongreso? Ĉu vi rimarkis en Esperanto iajn apartajn valorojn?

— Mi pensas, ke Esperanto posedas multajn valorojn. Kreante Esperanton, kiu ja estas lingvo tre simpla, d-ro Zamenhof trovis adeptojn en la tuta mondo. Li iniciatis ne nur la movadon de lingvouzantoj, sed ankaŭ de homoj konsciaj pri la bezono de mondskala interkompreniĝo. Ja multajn problemojn de la nuntempa mondo kaŭzas manko de kompreniĝo, aŭ de deziro interkompreniĝi. Multe pli pura estus la internacia klimato, se ĉiuj politikistoj, ĉiuj homoj sekvus la sintenon de aktiva kompreniĝado. Mi pensas, ke Esperanto kreas mondscale la eblecon interkompreniĝi. La agado de esperantistoj kreas ankaŭ la eblecon firmigi en la tuthomara memoro la valorojn de la kultura heredaĵo de la tuta homaro. En la Pola Parlamento maturiĝas la ideo pri okazigo de renkontiĝo de la prezidantoj de la parlamentoj de la ŝtatoj-membroj de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo por kuraĝe alfronti la eŭropan estontecon. Mi pensas, ke ĉi-koncerne la lingvo Esperanto kaj ĉi tiu socia movado de homoj dezirantaj realigi altajn celojn, atingi la klimaton de pli bona interkompreniĝo kaj kunlaboro, meritas specialan rekonon.

— Ĉu la fakto, ke vi devenas el Bjalistoko, la sama urbo, en kiu naskiĝis d-ro Zamenhof, ankaŭ influis vian decidon akcepti la honoran protektantecon?

— Mi jam diris al la kolegoj, ke la ĉefa premiso por mia decido enestis en la esenco mem de la E-movado, kiu kreas kondiĉojn por pli bona interkompre-

nigo kaj kunlaboro. Alia premiso certe estas la fakto, ke ni estas samurbanoj. La personeco de d-ro Zamenhof akompanis min ekde la juneco, ĉar li estas tre konata en Bjalistoko. Kun lia personeco mi kvazaŭ kreskis kaj maturiĝis. Mi povas diri, ke ni ĉiuj estas fieraj pro tio, ke Zamenhof devenas ĝuste el Bjalistoko.

— La nomo Bjalistoko estas bone konata al ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo. Ĉu laŭ via opinio, sinjoro prezidanto, en la historio de Bjalistoko estas periodo, pri kiu vi volus menciigi?

— Mi estas sub la granda impresio de la kruelaĵoj de la Dua Mondmilito, kiu kaŭzis grandan tragedion en la getto en Bjalistoko. Tiutempe en Bjalistoko loĝis multe da poloj juddevenaj, preskaŭ ĉiujn la faŝistoj neniigis en la getto. Parolante pri la martireco de la juda loĝantaro en Pollando ni ofte mencias la varsovian getton, sed ja tie, en Bjalistoko, la batalo kontraŭ la faŝistoj daŭris plej longe. Tio estis batalo trege heroo. Por frakasi la rezistadon de la defendantoj de la getto, la hitleranoj eĉ estis devigitaj uzi, mi memoras ĉi tion, tankojn kaj aviadilojn. Ĉion ĉi mi vidis per la okuloj de impresiĝema infano. Tio ankaŭ estis premiso, kiu igis min akcepti la honoran protektantecon de la jubilea kongreso. Mi opinias, ke okaze de la kongreso estas pripensinda starigo de internacia fondaĵo, kiu efektiveigus konstruon de internacia esperantista centro je la nomo de d-ro Zamenhof.

— La ĝisnuna vojo, tra kiu antaŭeniras la E-Movado, ne estis facila. Multaj esperantistoj opinias, ke en la daŭro de 100 jaroj oni jam devus atingi la planan tutmondigon de la lingvo. . .

— Esperanto estas tre juna lingvo, se ni komparas ĝin kun naciaj lingvoj aŭ kun la lingvoj, kiuj funkcias kiel internaciaj en diplomatio, ĉar ili havas pli longan tradicion. Se ni prenos en konsidero la ekzisto-periodon de Esperanto kaj la movadon, kiun ĝi kreis, tiam — tiel mi opinias, — oni devas paroli pri rapida progreso de Esperanto! Eble iam UN akceptos Esperanton kiel lingvon, kiu inter kelkaj lingvoj estos oficiala. Mi kredas, ke la vasteco de la medioj utiligantaj Esperanton, povas alkonduki al la rekonado de la lingvo ankaŭ en diplomatio, en UN, en internaciaj organizaĵoj, kiel unu el la laborlingvoj.

— Tre grava por la E-Movado estos la ĉi-jara Varsovia kongreso, kiu fiksos planojn por la estonta agado. Kiajn esperojn vi persone, sinjoro prezidanto, ligas kun ĉi tiu kongreso?

— Mia opinio la renkontiĝo de ĉirkaŭ 6 mil personoj en Varsovio, la kongreso mem, povas krei pliajn impulsojn por la universaligo de la lingvo, kio kreas la kondiĉojn por pli bona interkompreniĝo kaj kunlaboro en la estonteco. Kaj mi bondeziras, ke la kongreso bone servu al la plua disvastigo de la lingvo, kiu kreas mondscale la plej larĝajn kaj plej plenajn eblecojn por interkompreniĝo kaj kunlaboro kaj ankaŭ de fido en la tuta mondo. Tio estas tre bezonata por krei klimaton servantan al ĉiuj ĉi agadoj kaj iniciatoj, kiuj estos aparte valoraj por la paca sorto de la tuta homaro.

(Intervjuo de Andrzej PETTYN, elsendita de la Esperanto-redakcio ĉe Radio Polonia la 28-an kaj la 29-an de marto 1987.)

Kun mallongigoj)



La agado de bulgaraj esperantistoj 1929–1936

Kiel sciante, la Bulgara Esperanto-Movado estas unu el la plej malnovaj en la mondo kaj ĝia apero preskaŭ koincidas kun la apero de la Esperanto-movado ĝenerale.

En la vicoj de la internacia Esperanto-movado plimulton prezentis la etburgaj elementoj, sed poste aliĝis ankaŭ unuopaj marksisme orientitaj personoj.

Tial en 1921 en Prago estis fondita organizaĵo de revoluciaj esperantistoj sur unuecfontra bazo, apartigita de UEA. Ĝi estis nomita Sennacieca Asocio Tutmunda (SAT). Unuopaj personoj el Bulgario membris en SAT dum la unuaj jaroj post ĝia fondiĝo.

Iom antaŭ la apero de SAT, en 1920, la bulgaraj esperantistoj-komunistoj fondis komunistan Esperanto-rondon sub la nomo „Balkana Liberiga Stelo“ (BLS) kun sidejo en Sofio, kiu ekzistis ĝis la milit-faŝisma ŝtatrenverso, okazinta la 9-an de junio 1923.

La aperintaj dum 1927–1928 unuopaj laboristaj Esperanto-societoj serĉis manieron unuigi siajn fortojn en apartan, ekster la Bulgara Esperantista Asocio, klasbatalan organizaĵon en nacia skalo. Tiucele en 1929 komencis aperi la proleta Esperanto-revuo „Balkana Laboristo“, kies redakcio transformiĝis en stabon, ĉirkaŭ kiu unuiĝis la unuopaj societoj kaj aktivuloj. La 12-an de julio 1930 en Sofio okazis la Unua Nacia Konferenco de la proletaj esperantistoj en Bulgario. Ĝi fondis la klasbatalan Bulgaran Laboristan Esperanto-Asociacion (BuLEA). „Balkana Laboristo“ estiĝis ĝia organo. Ĉirkaŭ la redakcio de „Balkana Laboristo“ grupiĝis junaj literaturistoj, verkantaj en Esperanto. Ili okupiĝis pri tradukado de revolucia poezio kaj prozo el la bulgara en Esperanton. En daŭro de kvar jaroj (1930–1934) senĉese firmiĝis la vicoj de BuLEA, malgraŭ la kruela teroro, je kiu estis submetitaj ĝiaj societoj kaj aktivuloj.

BuLEA iniciatis tre aktivan eldonagadon. Estis relaborita kaj adaptita al la bulgaraj kondiĉoj la lernolibro de la sovetia aŭtoro S. Rubljov. Aperiis la originala verskolekto „Ruĝa Aŭroro“ de Asen Grigorov (sub pseŭdonimo M. Ljubin) la originala novelo „Du frontoj“ de Hristo Gorov (sub pseŭdonimo Hrista), rakontaro „Sur poŝteto“—traduko el la bulgara, de Ge-

orgi Karaslavov, versaĵoj kaj prozo de Hristo Smirnovski, k. a.

Car „Balkana Laboristo“ plenumis sian pioniran rolon, ĝi estis anstataŭigita de gazeto „Internacia Lingvo“, kiu aperadis bulgarlingve. Ties destino estis propagandi inter vastaj neesperantistaj progresemaj rondoj la utilon de disvastigo kaj praktikado de Esperanto por la celoj de la proleta klasbatalo.

En la komenco de la tridekaj jaroj elkreskis dekoj da aktivaj laboristaj kaj kamparanaj korespondantoj esperantistoj. La eldonpraktiko pruvis, ke estas maturigintaj la kondiĉoj por la anstataŭigo de gazeto „Internacia Lingvo“ per alia eldono de BuLEA en bulgara lingvo — „Internacia laboristakamparana korespondanto“ (ILKK), kiu estas unika fenomeno ne nur en la bulgara, sed ankaŭ en la internacia Esperanto-gazetaro. Ĝi estiĝis bonega tribuno kaj kolektiva centro por plua disvolvado de la fruktodona agado de la bulgaraj kaj eksterlandaj laboristaj-kamparanaj korespondantoj (labkamkoroj). De ĝi aperis entute 35 numeroj dum la periodo de la 10-a de novembro 1932 ĝis la 6-a de majo 1934. Tamen post la faŝisma ŝtatrenverso je la 19-a de majo 1934 ne nur „ILKK“, sed ankaŭ BuLEA mem estis malpermesitaj de la faŝista diktaturo.

Por efektivigo de korespondaj kontaktoj kun la eksterlanda proleta gazetaro BuLEA organizis specifan formadon konatan sub la

Esperanta nomo „PEK-servo“ (Proleta Esperanto-Korespondado). Oni eldonis bultenojn en Esperanto kun tradukitaj el la bulgara proleta gazetaro artikoloj kaj informoj pri la situacio kaj la bataloj de la laborista klaso, kontraŭ la faŝisma tiraneco. La bultenojn de „PEK-servo“ oni sendis alilanden, kie oni tradukis ilin en la koncernan nacian lingvon kaj disponigis ilin al la ĝenerala proleta gazetaro.

BuLEA estis nedisigebla parto de la tuta laborista movado en nia lando. Malgraŭ la persekutado de la faŝistoj la aktivuloj de BuLEA digne plenumis sian proletan devon.

Dum la sama periodo certan agadon kun ĝenerale demokratia tendenco faris la esperantistoj sub la standardo de la neŭtrala Bulgara Esperantista Asocio.

Bulgara Esperantista Asocio siateme organizis la tiel nomatajn „propagandajn (verdajn) semajnojn“, per kiuj enpenetris la neesperantistajn rondojn kaj varbis tie novajn adeptojn de Esperanto. Rezulte, en la tuta lando oni organizis kursojn de Esperanto, pluraj inter ili gvidataj de altkvalifikitaj lektoroj. Radio Sofio disaŭdigis programojn en Esperanto por eksterlando. Revuo „Bulgara Esperantisto“ aperadis regule.

CK de BEA kunvokis regionajn konferencojn en Plovdiv, Sumen, Asenovgrad, Orjahoŭo, Stara Zagora kaj Sofio, celante pliakтивigi la poresperantan propagandon kaj



Esperantistoj el Varna dum ekskurso — aprilo 1926.

plibonigi la organizan vivon de la Asocio. La laŭvica 16-a kongreso de BEA okazis en Vidin somere de 1929. Sekvis la kongresoj en Sofio (1930 kaj 1932), Stara Zagora (1931), Ruŝe (1933), Orjahovo (1934), Varna (1935) kaj V. Târnovo (1936).

Iom post iom la laboro de la preletaj esperantistoj koncentriĝis en la societoj de la neŭtrala Bulgara Esperantista Asocio.

La aktivularo de Bulgara Laborista Esperantista Asocio, evitinta areston kaj malliberejon, edukis tutan taĉmenton da bulgaraj esperantistoj en demokratia, progresema spirito, por laŭleĝa agado, direktita kontraŭ la bulgara faŝismo kaj ĝiaj hitleraj inspirantoj. Cio-ĉi donis pozitivajn rezultojn ne nur dum la konkreta historia periodo, sed ankaŭ dum la sekvantaj pli malfacilaj por la progresema agado jaroj en la antaŭvespero de la Dua Mondmilito kaj dum ĝia daŭro.

Nikola ALEKSIEV,
esperantisto-veterano,
honora prezidanto de MEM

ALTA DISTINGO

La honora prezidanto de MEM, la veterano-esperantisto kaj publicisto Nikola Aleksiev estiĝis laŭreato de la premio por ĵurnalistiko „Sofio'86“, aljuĝita de la Ĉefurba Popola Konsilantaro — pro lia libro „La ruĝa torĉo“.

Al la laŭreato ni bondeziras sanon kaj novajn sukcesojn sur la ĵurnalisa kampo.

„BE“



Kurso gvidita de G. Sapunĝiev — Varna, 1935.



Partoprenintoj en la XXIV Nacia Kongreso en Pazarĝik, 1937.

BEA post la 9-a de Septembro 1944

(Historia skizo)

La 9-an de septembro 1944 la soci-politika organizaĵo „Patrolanda Fronto“, unuiganta la progresemajn fortojn de la bulgara popolo, ĉe-kape kun la Bulgara Komunista Partio, per la decida helpo de la glora Soveta Armeo, renversis la burĝan profaŝisman registaron. Por nia lando kaj nia popolo venis la libero. Por nia Esperanto-movado, kiu depost 1941 estis plene malpermesita, same venis la libero.

La 4-an de oktobro 1944 sofiaj esperantistoj kunvokis eksterordinaran kunsidon de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio por restarigo de la asocia agado kaj por elekto de nova Centra Komitato de la Asocio.

La kunsido elektis novan CK de BEA, komisiante al ĝi gvidi la asociajn aferojn ĝis la okazigo de kongreso. Kiel prezidanto de la provizora Centra Komitato estis elektita prof. d-ro Stojan Guĝev.

La nova provizora CK de BEA ekfunkciis. Oni entreprenis paŝojn por eldono de lernolibro de Esperanto kaj por eldono de „Bulteno“, kiu provizore anstataŭis revuon „Bulgara Esperantisto“.

La 21-an de aprilo 1945 CK decidis kunvoki kongreson de BEA. Samtempe estis decidite fondi Sciencon Instituton de Esperanto.

La 15-an de julio 1945 estis fondita Bulgara Esperantista Koooperativo (BEK) Ĝia prezidanto es-

tiĝis Ivan Sarafov kaj sekretario — Evstati Cifudov.

La 2—4-an de septembro 1945 en Sofio okazis la 28-a Kongreso de BEA, kiu estis nomita UNUA LIBERA KONGRESO. Raporton faris la prezidanto de BEA prof. d-ro Stojan Guĝev.

Estis sendita saluttelegramo al Georgi Dimitrov, kiu tiutempe ankoraŭ estis en Moskvo, kun jena enhavo: „La bulgaraj esperantistoj, kunvenintaj en sia Unua libera kongreso en Sofio, sendas al Vi patrolandfrontajn batalasultojn kaj promesas utiligi siajn vastajn internaciajn ligojn por senmaskigi la malican malamikan propagandon kontraŭ nia demokrata patrolando“. Prezidanto: Triĉkov.

Georgi Dimitrov respondis tiun telegramon el Moskvo jene: „Mi dankas pri la salutoj de la kongreso de la bulgaraj esperantistoj. Siaflanke mi salutas vin okaze de la tutpopola festo de la libero — la historia kaj saviga por nia patrulando Naŭa de Septembro“. G. Dimitrov.

La kongreso pasis tre sukcese, ĉe granda entuziasmo kaj vigla partopreno de la kongresanoj.

Elektita estis nova CK de BEA en konsisto: prezidanto prof. d-ro Stojan Guĝev; sekretario Vitali Julzari; redaktoro Asen Grigorov, membroj: Ivan Sarafov, Svilen Sokolov, Ivan Iliev, Evstati Cifudov.

Fine de 1945 ĉe CK de BEA estis elektita komisiono por gvidado de la E-radio-elsendoj en konsisto: G. Dolapĉiev, Vasil Ĉočov kaj Kunčo Vălev.

En junio 1946 denove komenciĝis la eldonado de revuo „Bulgara Esperantisto“ kiel organo de BEA kaj BEK, kun redaktoro Ivan Sarafov.

La 29-a Kongreso de BEA okazis en urbo Asenovgrad de la 24-a ĝis la 26-a de septembro 1946. Ĝi estis bone organizita dank'al la aktiva helpo de la Sofia esperantista societo „Maksim Gorkij“. En la antaŭvespero de la kongreso Sofion alvenis delegitaroj kaj gastoj el Jugoslavio, Hungario, kaj Rumanio kiuj partoprenis la laboron de la kongreso.

Dum la kongreso en Asenovgrad okazis la Unua Balkanlanda Esperantista Konferenco. La revuo „Internacia Kulturo“ farigis kultura revuo de la esperantistaj asocioj de la balkanlandoj, kun ĉefredaktoro Asen Grigorov.

La Unua Balkanlanda Esperantista Konferenco en Asenovgrad akceptis decidojn pri plua agado por fonda de Balkanlanda Esperantista Federacio.

Post la kongreso en Asenovgrad daŭre disvolvigadis kaj firmigadis la kontaktoj inter la balkanlandaj esperantistaj asocioj kaj unuopaj iliaj reprezentantoj.

En n-ro 2/1947 de revuo „Bulgara Esperantisto“ Iniciata Komitato el junaj sofiaj esperantistoj publikigis Alvokon al la bulgaraj junuloj-esperantistoj por fonda de junulara fako ĉe CK de BEA.

En junio 1947 en urbo Varaĝdin, Jugoslavio, okazis la 13-a Kongreso de Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj la Dua Balkanlanda Esperantista Konferenco. Partoprenis grupo da 18 bulgaroj, gvidata de G. Dolapĉiev, kiuj guis varman, amikan akcepton.

Laŭ decido de CK de BEA, kiel delegitoj por la 32-a kongreso de UEA en urbo Bern (Svislando) estis elektitaj prof. d-ro Stojan Guĝev kaj Georgi Dolapĉiev. Ĝi estis la unua postmilita kongreso de UEA (fine de julio 1947). Niaj du delegitoj disvolvis aktivan agadon en la kongreso.

La 30-a Jubilea Kongreso de BEA okazis en Plovdiv de la 6-a ĝis la 9-a de septembro 1947. Denove partoprenis multnombraj delegitaroj kaj gastoj el Jugoslavio, Rumanio, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio.

Pliaj konatiĝoj, kontaktoj kaj kunlaborado realiĝis kun jugoslavaj, ĉeĥaj, rumanj, hungaraj kaj polaj esperantistoj.

Fine de julio 1948 en Budapeŝto okazis la laŭvica Balkanlanda Esperantista Konferenco.

En 1948 en urbo Jambol okazis la 31-a Kongreso de BEA.

La saman jaron la Ministerio de la Popola Instruado proklamis liberan malfermon de kursoj de Esperanto por ĝenerantoj, — kondiĉe, ke ili estas senpagaj.

Radio Sofia komencis elsendi ĉiutagan 15-minutan emision en Esperanto.

Restarigis sian agadon la Sofia esperantista societo „M. Gorkij“. Revigliĝis ankaŭ multaj esperantistaj societoj en la tuta lando. Komenciĝis aperado de bulteno, kiu multon kontribuis al la revigliĝo de la Esperanto-movado en la tuta lando.

La 32-a Kongreso de BEA okazis de la 1-a ĝis la 3-a de julio 1956 en Sofio, ĉe amasa partopreno de la bulgara esperantistaro. Ĉeestis reprezentantoj de ministerioj kaj de multaj amasaj sociopolitikaj organizaĵoj. Multaj oficialaj reprezentantoj kaj ĉiuj reprezentantoj de alilandaj esperantistaj asocioj salutis la kongreson.

Menciindas la salutparolo de la eminenta bulgara verkisto akademiano Georgi Karaslavov, granda amiko de Esperanto kaj memlerninta la Internacian Lingvon, dum sia juneco. Li aprezis la laboron de la esperantistoj kaj nomis ilin „ambasadoroj de siaj landoj en fremdlando“, kiuj popularigas la atingojn, la kulturon, la historion, la belecon de siaj landoj pere de tia potenco rimedo kiel la Internacia Lingvo.

Estis elektita nova Centra Komitato kun prezidanto Georgi Dolapĉiev, vicprezidanto Canko Murgin, sekretario Trajana Petkova, redaktoro Asen Grigorov. Elektita estis ankaŭ Centra Kontrola Komisiono.

Grava momento en la laboro de la 32-a Kongreso de BEA estis la Internacia konferenco, ĉiun reprezentantoj de la alilandaj delegitaroj, kiu okazis en salono ĉe la Rila-monahelo la 4-an de julio 1956, tuj post la fino de la kongreso.

Tio de la konferenco estis „Nia rilato al la diversaj internaciaj esperantistaj organizaĵoj“.

La konferenco unuanime decidis, ke oni subtenadu la laboron de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj rekomendis al la partoprenantaj organizaĵoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al ĝi, fari tion senprokraste.

Grava decido de BEA de tiu tempo estas la decido pri aliĝo al UEA. La Centra Komitato preparis aliĝleteron al la 41-a Universala Kongreso en Kopenhago, kiu estis kunsidonta de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1956 kaj la novelektita prezidanto de la asocio estis komisiita persone prezenti la aliĝleteron. Ĝi estis akceptita fare de la Estraro de UEA kaj BEA farigis regula membro. G. Dolapĉiev estis elektita kiel komitatano de UEA kaj partoprenis la laboron kiel membro de la financa komisiono.

Ekde januaro 1957 en Sofio komencis aperi nova monata revuo en Esperanto — „Nuntempa Bulgario“, riĉe ilustrita, kun materialoj pri ekonomio, sociaj problemoj, kulturo, arto, literaturo, teatro, muziko, sporto, filatelo k. a.

Aparte granda atingajo por nia movado en 1957 estis la enkonduko de duonhora Esperanta emisio de Radio Sofia. La elsendoj komenciĝis en junio 1957 kaj daŭris seninterrompe tutajn 18 jarojn, ĝis ties ĉesigo en 1975. Tradukistoj-paŝrolantoj de la emisio, estis komence



E-kurso en Kazanlák, 1938.

Georgi Dolapčiev kaj Tinka Lakova, poste G. Dolapčiev kaj Stefka Hristova. Redaktoroj de la emisio estis: komence Violin Oljanov, poste Ivan Sarafov, kaj post li Kiril Drajev.

La 33-a kongreso de BEA okazis en Varna de la 20-a ĝis 22-a de julio 1958. LKK estis elektita elinter la membroj de la esperantista societo „Albatroso“ en Varna sub la prezidanteco de la dekano de la Supera Ekonomia Instituto Belčo Nikolov, vicprezidanto doc. Georgi Dimov kaj aliaj kunlaborantoj. La kongreso, dank' al la valora helpo fare de la esperantistoj de Varna, estis tre bone preparita kaj organizita. Por unua fojo nian kongreson partoprenis gastoj el Vjetnamio kaj el Ĉinio. Estis ankaŭ reprezentantoj el Italio, Egiptio k. a. kapitalismaj landoj.

La 33-a kongreso reelektis la Centran Komitato por dua dujara mandato. Kiel vicprezidanto estis elektita Violin Oljanov kaj kiel sekretario — Krăstju Karucin.

En 1959, laŭ iniciato de Krăstju Karucin kaj G. Dolapčiev, aperis en esperanta traduko la romano „Sub la jugo“ — verko de la patriarko de la bulgara literaturo Ivan Vazov.

Granda kultura atingo de nia asocio, kiu efektiviĝis dum la jaroj 1957-1958 estis la fondo de Bulgara Esperantista Teatro (BET) kun reĝisoro Stefka Prohaskova. La teatro rapide ekĝuis popularecon kaj rekonon. Ĝi prezentis en ĉiuj tiutempaj kongresoj



Lernejana kurso en Gabrovo, 1940.

de BEA kaj en fremdlando. Aparte bone ĝi prezentigis dum la Jubilea Kongreso de UEA en Varsovio (1959).

En 1959, por unua fojo en nia lando, pro esperanta agado, okaze de la 15-a datreveno de la socialisma revolucio 1944, la prezidanto de CK de BEA estis dekorita de la Prezidio de la Parlamento per ordeno „Kirilo kaj Metodij“ I grado, ora.

La 34-a kongreso de BEA okazis de la 9-a ĝis la 12-a de julio 1960

en Veliko Tŕrnovo. Estis elektita nova Centra Komitato, kun prezidanto Hristo Gorov.

Jam maturiginta, akirinta novajn fortojn kaj adeptojn, la Asocio de la Bulgaraj Esperantistoj eniris digne la vicojn de la landaj kultur-organizaĵoj sub la aŭspicio de la Patrolanda Fronto kaj montris vigan patriotan kaj klerigan aktivadon.

Georgi DOLAPČIEV, esperantisto-veterano

Heroldo de noblaj ideoj

(80 jaroj deĉpost la apero de revuo „Lumo“)



Unu el la plej signifaj manifestiĝoj de la esperantistoj en Veliko Tŕrnovo dum la fruaj jaroj de Esperanto estas ilia iniciato kunvoki kongreson kaj fondi E-organizaĵojn. Per rimedoj de la membroj de la societo en oktobro 1906 ili eldonas la unuan numeron de sia presorgano — revuo „Lumo“. En la ĉefartikolo oni legas: „Per tiu eldono ni Tŕrnovaj esperantistoj, inter kiuj la esperanta fajrero donis unue vivajn rezultojn, celas unuiĝi ĉirkaŭ ni ĉiujn bulgarajn esperantistojn“.

Ĝefredaktoro de „Lumo“ estas la reveninta el Rusio Hristo Haralambev, administranto — Ivan Nenkov. La kreinto de Esperanto, d-ro Zamenhof, sendas specialan saluttleteron.

La unuaj tri numeroj, el kiuj la lasta triobla, estas zinkogarvuritaj. Deĉpost n-ro 6 (junio 1907) la revuo estas presata en presejo „Fŕrtuna“ — Veliko Tŕrnovo. Ĝi estas ilustrita per vidaĵoj de la urbo kaj enhavas belartajn tradukojn kaj esperantajn informojn.

Aparte aktive kunlaboris al „Lumo“ la Tŕrnovano rusdevena Hristo Trijakin, kun pseŭdonimo Kristo. Li unua (en Bulgario) verkas versaĵojn en Esperanto (1904), tradukas „Haĝi Dimitro“ de Botev, rakontojn de Elin Pelin, fabelojn de Stojan Miĥajlovski kaj versaĵojn de la rusa poeto Ivan Dmitriev. Sub lia talenta plumo aperas artikolo, en kiu li argumentite pravas la utilon de Esperanto por disvastigo de la socialismaj ideoj.

Bonajn tradukojn de fragmentoj el verkoj de bulgaraj verkistoj faras tiutempe Hralambi Baĉvarov, Georgi Aktargiev, Hristo Haralambev. Sur la paĝoj de „Lumo“ publikigas siajn versaĵojn ankaŭ Petro Jordanov — la plej signifiga bulgara E-poeto antaŭ la Unua Mondmilito.

Olga CANKOVA

Post la kongreso

... Jam de kelkaj jaroj, kiam la ideo de lingvo internacia vive okupadis la saĝojn de l' kulturaj landoj, kiuj fervore ellernadis la projekton de l' multtestiminda s-ro D-ro L.L. Zamenhof, unuoj el nia intelektularo, kiel s-roj G. P. Oreškov, Hr. Popov k. a., por honoro de nia kara patrujo, ne turnante atenton sur la laboro, prenis la malfacilan krucon de tiu nova ideo, fariĝis ĝiaj batalantoj — frukto de kies laboro estas la esperantistoj kaj la esperantista literaturo ĉe ni.

Tamen la samideanoj disjetitaj tra tuta Bulgario, ne povis ekvidi la batalon sen reciproka interkonsento por komuna agado. Aperis pro tio „Lumo“ — la organo de l' Tirnova Esperantista grupo, kiu grupigis ĉirkaŭ si la pionirojn de la lingvo kaj difinis la vojon de l' propagando.

Ne estas pobeble malkonfesi, ke dank' al ilia superforta laboro aperis multaj novaj esperantistoj kaj la kongreso, kiu fariĝis de l' reprezentantoj de tiuj esperantistoj en V. Tirnovo la 18—19-an de aŭgusto, nun nian jaron.

Al ili niajn plej sincerajn simpatiojn!...

La kongreso, kiu fariĝis la 18—19-an de aŭgusto en V. Tirnovo de la delegitoj de l' esperantistaj grupoj en nia lando, kaptita de l' nobla penso ekvidi plej baldaŭ ĉiujn konatigitajn kaj uzantajn en siaj internaciaj bezonoj la lingvon Esperanto, fordonis tute sian laboron, por realigo de tiu ĉi penso.

1. Ĝi ellaboris regularon, laŭ kiu la apartajn grupojn

pojn ligas en unu neŭtrala al ĉiaj religiaj kaj politikaj demandoj Bulgara Esperantista Ligo celanta: a) Doni plej vastan sciigadon de la helpa lingvo internacia „Esperanto“, kreita de D-ro Lazaro L. Zamenhof kaj prepari teraĵon por fakta ĝia akcepto kaj b) gvidi kaj subteni la komunikadojn de ĉiuj bulgaraj esperantistaj grupoj kaj fremdaj esperantistaj socioj.

2. Por realigi la supran celon la kongreso decidis, ke la Ligo dum la unua tempo komencu eldonadon de sia organo — „Lumo“, subtenu al spertaj homoj eldonadi aŭ ĝi mem eldonadu kaj disvastigadu broŝurojn, revuojn, librojn, ĵurnalojn k. s., subhelpu por formigado de grupoj, per kiuj oni aranĝu paroladojn, kursojn, bibliotekojn, referatojn, renkontigojn, kunvenojn, ekskursojn, amuzojn k. a.

Al la legantoj de „Lumo“ la redakcia komitato estas devigata sciigi, ke „Lumo“ nek plej malmulte ŝanĝos sian celon. Fidela al siaj antaŭdifinoj kaj kiel liga organo ĝi daŭrigos sur la sama vojo la propagandon de l' afero en la lando, kronikados la movadon kiel ĉe ni, tiel ankaŭ en fremdlando kaj donados esperantan legadon de komuna intereso. Samtempe la redakcia komitato intencas larĝigi sian kampon kaj plibonigi la revuon en ĉiu rilato.

(El revuo „Lumo“ — jaro I-a, n-ro 9, septembro, 1907 — kun mallongigoj).

Jaro III.

Septembro 1921

Numero 1.

Bulgara Esperantisto

ABONADO Bulgariando 20 levoj Fremdan. 25d. 150v. f. Aparia numero 10 sd.	MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO.	ABONAMENT: България 20 лева Странство 150 шв. фр. Отдаден брой 2 лева
---	--	--

Niaj taskoj.

La bulgara Esperanto — movado, kiu komenciĝis tre frue, ne prezentas seninterrompan naturan disvolvigon, en kiu la antaŭaj faktoj senpere kaŭzas la postirantajn.

La bulgara Esperanto-movado, kiu komenciĝis tre frue, ne prezentas seninterrompan naturan disvolvigon, en kiu la antaŭaj faktoj senpere kaŭzas la postirantajn.

En diversaj epokoj, en diversaj lokoj, de diversaj personoj ĝi estis komencata alterne, ne sukcesante stabiligi kaj akiri konstantecon.

La esperantaj gazetoj, aperintaj en nia lando, resp. pegulas la bildon de tiu movado. „Mondlingvisto“, „Esperanto“, „Rondiranto“, „Unua Paŝo“, „Bulgara Esperantisto“ (la unua eldono), „Trumpetisto“ — aperadis okaze, ekzistadis pene pli aŭ malpli longe, ĝis kiam laciĝis iliaj iniciatintoj, — kaj mortadis la gazetoj. Ĉiu vivis aparte, neniam rilateco, neniam komuniganta fadeno inter ili.

Nur de la jaro 1907 la movado en nia lando ekhavis pli grandan stabilecon. Tiam estis fondita la Bulgara Esperantista Ligo, kiu seninterrompe vivis ĝis la Balkana Milito, alternigante siajn centrojn en Tirnovo, Ŝumen, Sofia, subtenante sian daŭrecon, nature transformiĝinte en Bulgara Esperantista Societon.

Ankaŭ ĝia organo „Lumo“ aperadis seninterrompe dum tri jaroj kaj, kuniginte kun „Romana Esperantisto“, same nature daŭrigis sian vivon en la gazeto „Danubo“.

Post la milito kvankam la cirkonstancoj estis ŝanĝitaj, la bulgaraj esperantistoj rekomencis sian agadon sur la fundamento, kreita de la bulgara Esperantista

Ligo kaj ĝia sekvanto Bulgara Esperantista Societo. „Danubo“ ne povis reaperi, sed naskiĝis „Bulgara Esperantisto“, kiu sukcesis stabiligi kaj atingi ĝis sia tria jaro.

Se en la pasintaj jaroj la Esperanto-movado ne povis fortiĝi kaj atingi la necesan altan gradon, la kaŭzo estas nome en la fakto, ke la agantoj ne estis unuigitaj, ke la fortoj estis neorganizitaj, ke mankis sistemo en la laborado, ke la sperteco de la antaŭaj pioniroj restadis neutiligita de la postaj.

En la lastaj jaroj ni atingis verajn sukcesojn, ĉar la movado akiris unuecon, ĉar ĝi ne dependas jam de apartaj personoj, de kies agoj kaj kapablecoj ĝi povis ekskluzive ekzisti dum la pasinteco kaj kiuj ofte povus kompromiti ĝin per sia sentakteco. La movado estas nun en la manoj de la tuta bulgara esperantistaro; ĝi daŭras, disvolvas sin nature kaj progresas. Unu post alia kiel koncentraj cirkloj, aperadas ĉiam pli kaj pli novaj taskoj.

Pasis la infana aĝo de nia movado, kiam ni zorge devis flegi ĝin kaj timi ĉiun malbonan okazon. Ni sukcesis preskaŭ veni al la momento, kiam la afero komencas kreski per si mem, per la inercia movo, donita de la bulgaraj esperantistoj dum la jaroj postmilitaj. Ĉiu tago alportas al ni aperon de novaj esperantistoj. La malnovaj ankaŭ komencas sin montri.

Kia devus esti nia nuna tasko?

Eltrante la instruon el la pasinta tempo, trovinte la kaŭzojn de la malforteco, ni devas turni nian plej grandan atenton al la unuigado de la bulgaraj esperantistoj, por plifirmigo de la kreita komuna fundamento — Bulgara Esperantista Societo.

Unueco kaj organizeco — jen nia tasko dum la nova jaro. Per ĝi ni atingos multe pli grandajn rezultojn, ol per la superfortaj penadoj de apartuloj ĝis nun.

Tion devas kompreni ĉiu. Lasu jam la apartiĝemon, unuigu la fortojn, eksentu la fratan ŝulttron apud la vian. — Tiel ni goje povos nin saluti post unu jaro en la nua kongreso per pli grandaj atingitaj sukcesoj.

At. D. ATANASOV.

(El „Bulgara Esperantisto“ — monata organo de Bulgara Esperantista Societo — jaro III, Septembro, 1921, numero 1)

PONTO INTER GENERACIOJ

Estimataj legantoj,

Ni proponas al vi ne tre kutiman intervjuon. Marjana Zlatanova, lernantino en la unua eksperimenta klaso por lernado de Esperanto en 8-a Sofia mezlernejo „Vasil Levski“, intervjuis la prezidanton de BEA Hristo Gorov. Vi konstato, ke niajn junajn esperantistojn intereso ne nur la hodiaŭa tago, ili turnas rigardon ankaŭ al la heroa pasinteco de la Esperanto-movado en nia lando.

— *Kamarado Gorov, kiam vi komencis lerni esperanton? Per kio allogis vin la Internacia Lingvo? Ni scias, ke dum pluraj jaroj vi verkis Esperante. Bonvolu rakonti al ni pri la komenco, kiel vi malkovris vian destinton de poeto?*

— Jam kiel lernanto mi okupiĝis pri franca lingvo, kun Esperanto mi konatiĝis en 1925. Mi preferis ĝin kiel plej facile lerneblan. Mi lernis sola — laŭ la lernolibroj de Ivan Sarafov kaj Atanas D. Atanasov. Jam en la komenco de mia literatura E-agado mi esperantigis verkojn de bulgaraj poetoj — Pejo Javorov, Hristo Smirnenski. Al mi plaĉis la revolucia temaro. Per Esperanto mi pli bone ekkonis la bulgaran lingvon. Post certa periodo mi mem provis verki versojn — pri la kontraŭfaŝisma batalo, pri la Septembra Ribelo, ktp.

En malgranda esperantista literatura rondo ni pri diskutadis literaturajn verkojn, interŝanĝis pensojn. Membroj de tiu rondo estis studentoj kaj lernantoj el la gimnazio en Asenovgrad.

— *Vi partoprenis la kontraŭfaŝisman batalon kiel partizano en brigado „Georgi Dimitrov“. Ĉu la Internacia Lingvo iel influis vian decidon aliĝi al la batalo, por mondo justa kaj paca?*

— Jes, pere de Esperanto mi aliĝis al la paca batalo. Mi korespondadis kun progresemaj esperantistoj — tio ja estis forta ligo kun la revolucia mondo.

Tuj post kiam estis organizita rezista movado, mi komencis helpi la partizanojn en mia regiono per havigo de vestaĵoj, ŝuoj, nutraĵoj. Pli poste mi mem iris la malfacilan vojon de partizano. En la brigadon mi estis sendita kun la tasko eldoni partizanan gazeton, flugfoliojn, ktp. Antaŭe mi estis redaktoro de gazeto „Oteĉestven glas“ („Patrolanda Voĉo“) — organo de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto en urbo Plovdiv.

Dum la Patrolanda Milito mi daŭrigis versi. Ĉar la partizana brigado „Georgi Dimitrov“ ne havis sian himnon, oni komisiis al mi la taskon verki la tekston.

— *Bonvolu rakonti al ni pri via ĉiutageco?*

— Mia ĉiutageco estas varia — mi plenumas miajn deojn en BEA kaj dum la libertempo okupiĝas pri verkado, pri socia aktivado kaj legado.

— *Kia estas la celo de via vivo? Via idealo pri homo?*

— Celo de mia vivo estas labori por plena triumfo de la komunismo. Mi donis al la Partio kaj la popolo ĉion, laŭ miaj fortoj kaj ebloj. Mia idealo estas — servi honeste kaj sindone al la ideoj de socialismo, por realigo de la revoj de miaj pereintaj kamaradoj.

— *Kiel prezidanto de BEA vi sendube havas multe da problemoj. Ĉu en via laboro vi kunpuŝiĝas kun formalismo kaj burokrateco?*

— En nia laboro ne estas similaj aĵoj — ja ni ĉiuj plenumas nian laboron libervole, laŭ propra elekto.

— *Viaj estontaj kreoĉplanoj?*

— Mi dediĉas ĉiam pli multajn verkojn al la pacbatalo. Mi dezirus ankaŭ estonte plenumi mian asocian laboron, labori kiel ĝis nun — kun juneca impeto.

— *Pri kio vi malkontentes?*

— Pro la manko de libera tempo. Mi preferus dediĉi pli da tempo al miaj literaturaj okupoj.

— *Kaj lasta demando — kiu problemoj emocias vin nuntempe?*

— Antaŭ ĉio — la paco. Sen paco ne eblas kreado kaj progreso. Ni batalu, por ke estu pura nia ĉielo! Sen raketoj, sen armiloj, kiel diris k-do Gorbaĉov.

Intervjuis: Marjana ZLATANOVA

H. M. HRIMA

JUBILEAJ VERSOJ

Mi dankas al vi, Esperanto,
ĉar vidis multon en la mond':
riverojn, urbojn, plej gigantajn
kaj fratojn en la Sud' kaj Nord'.

Observis mi de kaj' Ŝanhaja,
ĉe bordo de river' Jangzi:
klopodas por glas' riz' kaj sojo
formikoj-homoj de Ĉini'.

Impresis min ĉe la Tamizo
palacoj, bankoj de burĝar',
dum sub la ponto kvazaŭ ftiza
etendis manojn juna par'.

Ekskursis mi per ŝipo vela
en la haveno de Hamburg',
kaj vidis tombojn preter Elbo —
de bombardado la rezult'.

Admiris mi riveron Sejno,
la katedralon sur la bord'
kaj ĝuis el la tur' Ejfela
la faman placon de Konkord'.

Danub' kun perlo Budapeŝto,
Danub' kun luksa urb' Vien',
en la memoro ĉiam restos
kongresaj urboj ĉe l' river'.

Mi dankas al vi, Esperanto,
ĉar ĝuis multon en la mond'.
Vi longe vivu, pacaganto,
kaj estu inter homoj pont'!

KUN AMO KAJ FERVORO...


Esperanto-societo „Amikeco“ en vilaĝo Zimnica, distrikto de Jambol, celebris la 75-jaran jubileon de Jordan Bančev — multjara prezidanto de la societo. La solena kunveno okazis en la vilaĝa E-klubejo, kie estis aranĝita ekspozicio de multaj libroj, leteroj, afiŝoj kaj aliaj esperantaĵoj, ricevitaj de Jordan Bančev el diversaj landoj.

La jubileon partoprenis Petăr Todorov, vicprezidanto de BEA, Dimităr Hristov — vicprezidanto de DE de BEA en Jambol, la prezidanto de la medicina E-societo en Jambol d-ro Popova.

Elka Pejčeva parolis pri la vivo kaj E-agado de Jordan Bančev. P. Todorov bondeziris al la jubileulo sanon, feliĉon kaj novajn sukcesojn sur la Esperanto-kampo. En la nomo de la distrikta esperantistaro la veteranon salutis D. Hristov.

Folkloro kantgrupo salutis Jordan Bančev per siaj plenumoj. La kortuŝita jubileulo sincere dankis pro la atento.

Dobrinka VASILEVA



Unu el la plej meritoplenaj esperantistoj en Jambol-distrikto estas Jordan Bančev Jankov, naskita la 26-an de januaro 1912 en vilaĝo Zimnica. Jen kion li rakontis pri si mem kaj pri la esperantista movado en lia naskiĝvilaĝo:

— En 1933 mi komencis lerni francan lingvon, sed la sekvontan jaron mia amiko Jordan Totev alportis en nian vilaĝon lernolibron de Esperanto. Kune kun nia samvilagano Jeljazko Daskalov ni tuj senpacience foliumis ĝin. Sur la paĝoj estis multaj ilustraĵoj, la lingvo ŝajnis facila kaj ni decidis lerni ĝin. Tiel ekbrilis la fajrero de la Lingvo Internacia en vilaĝo Zimnica...

Poste ni liveris el Sofio pliajn lernolibrojn. Intertempe ni eksciis, ke la vilaĝestro Krăstjo Jelezarov, sofiano, kun supera klereco, estis esperantisto kaj ni invitis lin por gvidi kurson de Esperanto. Komence de 1935 ni jam fondis esperantistan societon, kiun ni nomis „Amikeco“. Ĝia prezidanto estiĝis Jeljazko Daskalov, kasisto — Jordan Totev, kaj mi respondecis pri la kontrolo komisiono. La sekvontan jaron reprezentanto de nia societo en la nacia E-kongreso en Sevlievo estis Jeljazko Daskalov. Tie li konatigis kun sofiaj esperantistoj, kiuj post la kongreso komencis sendi al li la E-revuon „Bulteno“. El Francio Jeljazko Daskalov tiutempe ricevis revuon „Senaciulo“, kaj mi — revuon „Laboristo“ el Italio.

Lun vintran vesperon de 1936, dum esperantista kunveno en la loka lernejo, naskiĝis la ideo pri fondo de abstinencula societo. Post unu semajno ni vere

fondis ĝin, ĉe-frunte kun la junaj esperantistoj Penjo Kurtev (nun profesoro en Plovdiv) kaj Tenjo Petkov (nun generalo). Ili tuj abonis por la societo la abstinencajn eldonaĵojn „Sobra Junularo“, „Sobra Batalo“, „Sobra Penso“. . . Fakte en la legejo esperantistoj kaj abstinenculoj gvidis la tutan kulturan kaj klerigan agadon en la vilaĝo, prezentis anatorajn teatrospektaklojn, aĉetis radioricevilon kaj ĝis malfrua vesperhorso aŭskultis novaĵojn el Moskvo pri la situacio sur la fronto de la Dua Mondmilito.

La saman jaron la esperantistoj kaj la abstinenculoj el Zimnica gastis en la apuda vilaĝo Gorno Aleksandrovo, distrikto de Sliven, kie laŭ iniciato de la lokaj junuloj ni partoprenis la fondon de esperantista kaj abstinencula societoj. En tiu ĝoja tago ni ne sciis, ke en la vespera krepusko de la 18-a de majo 1944, post kelkaj jaroj, iuj el la junuloj el Gorno Aleksandrovo (Kirčo Sandanski, Velčo Gerĝikov kaj Petăr Dobrev) estos palmortigitaj proksime de la vilaĝo (en la loko „Sultan dere“) kiel aktivaj remoj kaj partizanhelpantoj de la taĉmento „Morton al la faŝismo“.

En 1936 Jeljazko Daskalov kaj Jordan Bančev estis delegitoj de la E-kongreso en Gorna Orjahovica. Tie ili konatigis kun Asen Grigorov, Stefan Kadiev, Metodi Pančev, Raŝo Soselov. . . Sekvontjare ili partoprenis la kongreson en Stara Zagora.

Venis 1939. La monarko-faŝisma registaro likvidis la esperantistan kaj abstinenculan societojn, bruligis iliajn arkivojn kaj literaturon. Penjo Kurtev, lia frato Veliko Kurtev kaj Tenjo Petkov estis arestitaj kaj provizore alilogiĝitaj en Gigen. Jeljazko Daskalov estis sendita al la turka-greka landlimo, kie li malŝanigis kaj mortis en 1941. En tiu periodo pereis ankaŭ aliaj fidelaj amikoj. . .

Restis viva nur unu el la unuaj esperantistoj en Zimnica — Jordan Bančev. En la vivo de E-societo „Amikeco“ estis periodoj de supreniro kaj de stagnado, sed Bančev estas ĝia neanstataŭigebla gardostaranto — ĉiam sur sia posteno, li agitas instruistojn kaj junulojn por Esperanto, havigas al ili lernolibrojn, vortarojn, insignojn, organizas E-kursojn. Kaj nun, jam 75-jara veterano, li ĝojas kiel infano pri ĉiu nova inda adepto de Esperanto.

Jordan Bančev rakontas ankaŭ pri la jaroj post la 9-a de Septembro 1944, kiam li partoprenis la naciajn E-kongresojn en Jambol (1948) kaj en Burgas (1962), kie li konatigis kun multaj elstaraj bulgaraj esperantistoj. Li vizitis ankaŭ la UEA-kongresojn en Sofio (1963) kaj Varna (1978).

Nun, antaŭ la centjarigo de Esperanto, la plej granda deziro de nia estimata veterano Jordan Bančev estas partopreni la Jubilean Kongreson en Varsovio.

Dimo TRUDOLJUBOV



Komuna foto de esperantistoj-abstinenculoj el la vilaĝoj Zimnica kaj Gorno Aleksandrovo, 1936.

LA OKDEKJARA BULGARA E-POEZIO

La Bulgara Esperanta poezio aperis preskaŭ samtempe kun la penetro de la Internacia Lingvo en Bulgario. La unuaj poeziaj provoj estas mallertaj kaj nekuraĝaj, sed ili atestas pri la vigla intereso al Esperanto kaj pri la deziro de la unuaj bulgaraj esperantistoj esprimi sin verse en tiu ĉi lingvo ankoraŭ nova kaj ankoraŭ ne sufiĉe elprova en poezio.

La unua pli signifa poeto estas Hristo Rjahoŭski. Liaj poemoj montras, ke la Esperantan poezion eniris homo, kiu ne nur bone regas la lingvon, sed kiu posedas originalan poezion senten.

Tuj post Rjahoŭski viciĝas Petro Jordanov. Li pli kuraĝe elprovas la eblojn de la lingvo, serĉas reliefaĵn komparaĵojn kaj metaforojn. En liajn poemojn jam enŝteliĝas sociaj motivoj kaj li scipovas simbole aludi pri la mizero, pri la homaj turmentoj.

Post la Unua Mondmilito, kiel en tuta Eŭropo, same en Bulgario komenciĝas tempesta revolucia periodo. La Granda Oktobra Socialisma Revolucio triumfe proklamis la unuan en la mondo proletan ŝtaton. La Esperanta poezio, kreita en nia lando, ne restis fremda al la revoluciaj eventoj. Aperis poemoj saturitaj de revolucia patoso, de optimismo kaj kredo je la nova vivo.

En la dudekaj jaroj granda historia evento skuas nian patrolandon. La 23-an de septembro 1923 eksplodis la Kontraŭfaŝisma Septembra Ribelo, kiu prezentas la kulminon de la popola batalo kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo. La sublimaj historiaj eventoj naskas talentulojn kaj la revolucia impeto naskis unu el niaj plej grandaj E-poetoj — Dimitar Zlatarski. Neniu alia sukcesis tiel poezie, tiel inspirite kiel li respeguli la Septembran Ribelon. En lia poemo „Fajrego en Septembro“ ni sentas la furiozon de la ribelo, la popolan sopiron al libereco kaj justeco.

Zlatarski riĉigis nian Esperantan poezion per novaj esprimoj. La ritmo de lia poemo estas anhela, streĉa, liaj puraj rimoj tintas kiel sonoriloj.

Dum tiu ĉi periodo maturiĝis la talento de alia elstara Esperanta poeto — Asen Grigorov. Grigorov eniris nian poezion kun poemoj perfektaj laŭ la formo, en kiuj senteblas motivoj, karakteraj por la tiama bulgaraj simbolistoj (Dimčo Debeljanov, Nikolaj Liliev k. a.) Iom post iom tamen en la poezio de Grigorov ekonis revoluciaj kordoj. Li klare vidis la historian rolon de la proletaro. Tion plej bone pravas la poemoj el lia poemaro „Ruĝa Aŭroro“.

La periodo inter la du mond militoj estas ege fruktodona por la bulgara Esperanta poezio. Dum tiu ĉi tempo kreiĝis multaj poetoj kiel Stefan Masarov, Vitali Julzari, Marin Bălgarenski, Dočo Stanev, Stefan Bobev kaj aliaj. Ili riĉigis nian poezion per novaj temoj, ideoj, motivoj.

En la tridekaj jaroj nian poezion eniris Hristo Gorov — poeto kun tre individua kaj forta poezia voĉo. Gorov impresis la legantojn per sia longa „Poemo de l'Plugisto“, kiu havas ne nur aŭtobiografiajn karakteron, sed prezentas vastan panoramon de la revolucia impeto de nia popolo antaŭ kaj post la Kontraŭfaŝisma Septembra Ribelo.

En 1937 aperis la unuaj poemoj de Violin Oljanov. Li estis apenaŭ deksepjara, kiam komencis verki Esperante. En nian poezion li alportis novajn, freŝajn tonojn. Unue li riĉigis ĝin per la Esperantaj temoj. Tre karaktera estas la poemo „50 Jaroj“, en kiu la poeto sincere deklaras sian grandan amon al la Internacia Lingvo.

Dum tiu ĉi periodo ekonis la poezia voĉo de alia nia poeto — Canko Murgin. En sia poezio Murgin preferas la klarajn, helajn tonojn. Liaj unuaj poemoj estas direktitaj ĉefe al la esperantistoj, al tiuj, kiuj dediĉas sin al la ideo de Lingvo Internacia.

Parolante pri tiu ĉi periodo, ni ne rajtas preterlasi la nomojn de du aliaj signifaj poetoj — Marin Bălgarenski kaj Georgi Dikovski, kiuj poezie esprimis

sian firman kredon kaj fortan amon al la Internacia Lingvo.

La eksplodo de la Dua Mondmilito minacis la ekziston de Esperanto. Tamen la milito ne timigis ĝiajn adeptojn. La esperantistoj ekagis pli kuraĝe kaj pli sindone.

La poezio, kreita dum tiu ĉi tempo, estas signifa ne nur por la bulgara, sed same por la monda Esperanta literaturo, ĉar niaj poetoj per novaj ideoj kaj temoj riĉigis la mondan Esperantan literaturon.

La bulgaraj Esperanto-poetoj ĝoje salutis la venkon super la faŝismo kaj inspirite priantis la komencon de la nova vivo. Tiutempe aktive verkas Dimitar Zlatarski, Hristo Gorov, Asen Grigorov, Violin Oljanov, Canko Murgin kaj aliaj. Asen Grigorov entute dediĉas sian lirion al la konstruado de la nova vivo en Bulgario. Tamen en lia poezio trovas lokon ankaŭ motivoj pri la naturo, pri la amo. La talento de Grigorov plene ekfloris kaj li estigis la plej elstaran Esperanta poeton en Bulgario.

Dum la lastaj jaroj Hristo Gorov verkis multajn poemojn pri la amikeco kaj paco, kiel „Ĝis Revido“, „Tri Militoj“ kaj aliaj. Violin Oljanov verkis belegajn poemojn pri la naturo („Aŭtuno“, „Aŭtuno en la arbaro“ k. a.). Li enrigardis profunden en sian koron kaj montris siajn plej intimajn pensojn kaj sentojn en la poemoj „La Pordo Fermiĝis“, „Konversacio kun Portreto“ k. a.

Simeon M. Simeonov, kiu komencis verki jam en 1922, lastatempe dediĉis plurajn poemojn al Esperanto, al amikoj esperantistoj. Alia signifa nuntempa poeto estas Todor Soŝev. Liaj emociaj kaj sinceraj ampoemoj rememorigas al ni, ke amo havas la magian forton venki malfacilaĵojn kaj dolorojn. Soŝev majstre regas la soneton.

Inter la pli junaj poetoj elstaras Venelin Mitev kaj Nikola Pilev, kiuj riĉigis nian nuntempan poezion per intimaj tonoj. Se la voĉo de Mitev estas vigla, iom anhela, tiu de Pilev sonas pli trankvile, liaj versoj similas al intima konfeso.

La periodon post la Dua Mondmilito karakterizas la fakto, ke en nia poezio ekonis pluraj inaj voĉoj. Menciindas la nomoj de Penka Batoeva, Ljuba Bojaĝieva, Rosica Georgieva, Sinka Filaretova, Penka Papazova k. a.

Penka Batoeva apartenas al tiuj poetinoj, kiuj penas en bildoj, ĉiu frazo en ŝiaj poemoj estas memstara bildo, memstara poezia figuro.

Ljuba Bojaĝieva havas alian poezian inklinon. Ŝi emas kontempladi la naturon. En ŝiaj poemoj la bildoj estas kvazaŭ senmovaj kaj ŝi atente esploras ĉe la plej etajn detalojn, kiuj sugestas pensojn kaj emociojn.

Al la nuntempa bulgara poezio aktive kontribuis Dimitar Danĉev, Danĉo Danĉev, Marin Băcev kaj aliaj.

Karakteraj por nia plej nova poezio estas la varieco de temoj. Niaj poetoj inspire priantis ne nur la novan vivon en nia lando, sed ili profunde enrigardis en la koron de la nova homo, ili lirike interpretis la plej subtilajn homajn sentojn kaj pensojn.

Dum okdek jaroj la bulgara Esperanta poezio transiris longan malfacilan vojon. Ĝiaj fidelaj kreantoj devis serĉi la ĝustan tonon, devis perfektigi la formon, pli kaj pli profundigi en la problemojn kaj ideojn de la vivo. La okdekjara bulgara Esperanta poezio respegulas la sopirojn, la revojn de ĉiuj esperantistoj en la mondo, ĉar ĝi priantas ĉefe la dezirojn de ĉiuj progresemaj homoj vivi en paco kaj amikeco.

En la poemoj de preskaŭ ĉiuj bulgaraj Esperantaj poetoj ni trovas temojn kaj motivojn, kiuj pravas, ke nia okdekjara poezio estas vera Esperanta poezio, kiu delonge okupas indan lokon en la trezorejo de la monda Esperanta literaturo.

Georgi MIRALKOV

La vigla kaj entreprenema loĝantaro de Gabrovo ĉiam estis adepto de ĉiuj novaj kaj progresemaj ideoj. Tie ĉi estas fondita la unua bulgara laika lernejo, tie trovas favoran grundon la socialismaj ideoj, ekĝermas nia socialisma gazetaro. En la komenco de nia jarcento kelkaj gabrovanoj ekscias pri Esperanto kaj komencas lerni ĝin.

En 1911 la instruisto Dimităr Malĉev okazigas kurson de Esperanto. Baldaŭ post tio en la urbo estas fondita la esperantista societo „Semo“. Ĝia unua prezidanto estas la komunisto Vasil Tabakov, tekstlaboristo. Ankaŭ en la sekvaj estraroj estas elektataj komunistoj kaj aliaj progresemaj homoj.

La revolucia leviĝo dum la 20-aj jaroj influis ankaŭ la esperantistojn. Ĉe la restarigo de la societo, post la Unua Mondmilito, en 1919, ĝi estas nomita „Karl Liebknecht“ — laŭ propono de la fervojisto Hristo Kolev, kiu estis laborinta kelkajn jarojn en Drezdeno kaj persone konis Liebknecht kaj Rosa Luxemburg. Pli poste tamen ĝi devis ricevi la „neŭtralan“ nomon „Verda Torĉo“.

Dum tiuj jaroj 40 bulgaraj esperantistoj membras en la internacia revolucia esperantista organizaĵo SAT, kaj 10 el ili estas el Gabrovo. En la jarlibro de SAT por 1923, kie estas presitaj la nomoj de ĉiuj membroj de la organizaĵo, oni povas legi ankaŭ la nomojn de la ses esperantistoj el la estraro de „Verda Torĉo“: № 1329. Hristo Kolev, fervojisto, № 1330. Penĉo Stajkov, inĝeniero; № 1341. Vasil Tabakov; № 1039. Ljubomir Avramov, librovendejo „Nauka“; № 2616.

Vasil Popov, Popola Domo; № 2615 Stojan Ivanov, bankoficisto.

Dum kelkaj jaroj en SAT membras ankaŭ la gabrovanoj Penĉo Bojnov, Ivan Matev, Kosta Kolev kaj Ivan Skodrov. Ili ricevas la eldonojn de tiu organizaĵo, sendas al ili informojn kaj artikolojn direktitajn kontraŭ la kruelaĵoj de la reakcia burĝa registaro en Bulgario post la frakaso de la Septembra Ribelo en 1923.

Tiutempe la oficisto Penĉo Bojnov (supre jam menciita) korespondas en Esperanto kun la franca verkisto Henri Barbusse. Rezulte de tiu korespondado en 1925 en la gazeto „Paris dimanche“ aperas la artikolo de Barbusse „Bulgario — lando de pendumiloj“, kaj en 1926 — lia romano „La ekzekutistoj“. Pro sia korespondado kun la granda franca verkisto Bojnov estas arestita kaj oni avertas lin ne plu sendi materialojn alilanden.

La progresema laboro de la gabrovaj esperantistoj daŭras plu ankaŭ dum la 30-aj jaroj. Tial la lokaj aŭtoritatoj suspekto rigardas al la societo, malhelpas ĝian laboron, multaj esperantistoj estas arestataj kaj malliberigataj. Dum la periodo 1938—1940 kaj 1941—1944 la societo estas likvidita fare de la regantoj. Malgraŭ tio la esperantistoj amase partoprenas la kontraŭfaŝisman batalon — en la distrikto kiel partizanoj pereis 25 esperantistoj dediĉintaj sian vivon al la batalo por nova, pli bona kaj pli justa socia ordo.

Bojana PRODANOVA

E-FAMILIOJ EN SUMEN

En Sumen estas multaj E-familioj. Kaj nature, kiam la geedzojn interligas ankaŭ la nobla poresperanta ideo, tiam inter ili ekzistas pli da fideleco kaj interkompreniĝo. Ili povas ne nur pli sukcese praktikadi la lingvon, sed instrui ĝin al siaj gefiloj, pli aktive propagandadi kaj disvastigadi ĝin inter parencoj, ĝeamikoj, gekolegoj. Ili havas komunan celon, komunajn strebojn.

La unua esperantista geedziĝo en Sumen okazis antaŭ pli ol 80 jaroj — la fondinto de nia societo „Vekiĝo“ Ilija Silvestriev konatiĝis kun sia edzino Jurdanka per Esperanto. Nun ŝi estas la plej maljuna esperantistino en Sumen, honora membro de „Vekiĝo“, unu el ĝiaj kunfondintoj kaj multjara E-agantino. Familio de esperantistoj estis ankaŭ tiu de Ksenofon Jankov — la unua sekretario de „Vekiĝo“. La tradician sekvis Atanas Bojaĝiev — multjara prezidanto de „Vekiĝo“ post la 9-a de Septembro 1944, batalanto kontraŭ la faŝismo, nun honora prezidanto de DE de BEA. Lia edzino Zdravka ĉiam aktive kaj volonte helpadis lian prezidantecon, propagandadis Esperanton inter la instruistaro. Li esperantigis ankaŭ sian bofilinon kaj unu el siaj nepinoj. Nuntempe E-familioj estas: Veska Dragostinova — prezidantino de DE de BEA, kaj ŝia edzo Dimiăr Minĉev — sekretario de DE, de Cvjatko Todorov — prezidanto de „Vekiĝo“, kaj lia edzino Nikolina Ljubenova, d-ro Ljudmil Conov — prezidanto de E-societo „Sano“, kaj lia edzino Antonia. Ĉiam viglaj kaj agemaj estas la geedzoj Ivan Smokov, kontraŭfaŝisma batalanto, kaj Liljana Smokova — estrarano de „Vekiĝo“. Esperantista veterano estas la nuna prezidanto de la Kontrola Komisiono de DE BEA Georgi Marov. Lian vojon nun sekvas lia filino Neli Jurdanova, sindona juna aktivulino. Aktiva esperantisto estis ekskolonelo Dimităr Penĉev, partopreninto en la Dua Mondmilito, kiu dedaŭrinde forpasis sufiĉe juna. Nun en niaj vicoj estas lia edzino, eksmajoro Maria Penĉeva.

En Sumen ne mankas ankaŭ internacia E-familio. Esperanto estas edzperanto por Marija Petkova kaj la hungaro Gejza Kiŝi. Ni esperu, ke ilia unujara filine-to estos ankaŭ esperantistino. Tiamaniere Marije kaj

Gejza daŭrigos la banan tradicion de la ŝumenaj E-familioj.

Cvjatko STOJANOV

OKAZE DE LA CENTJARA JUBILEO

La 29-an de marto j. k. en la Blua Salono de legejo „Konkordo“ en Jambol okazis solena plenkunsido de DE de BEA, dediĉita al la centjara jubileo de Esperanto.

Raporton pri la historio de la E-movado en Bulgario kaj en la distrikto de Jambol tralegis Dimităr Hristov — vicprezidanto de DE de BEA. Li parolis pri la unua esperantisto en Jambol Penko Petrov, kiu komencis lerni la Internacian Lingvon en 1899 kaj korespondis kun d-ro Zamenhof, pri la unua urba societo „Laborem“ fondita en 1910, pri la esperantistoj Kolju Tenev (Ravaŝolata) kaj Minko Minkov (pereintaj por la popola libero) kaj pri la veterenoj Doĵo Tenev, D-ro Zahari Popnikolov, arĥ. Aleksandăr Kurtev, Conju Panĉev, Bojan Kuŝev, Ivan Atanasov, Ljuba Bojaĝieva k. a.

En Jambol kaj la distrikto okazis interesaj aranĝoj: Nacia Esperanto-Kongreso (1948), X Nacia Revuo de Esperanto-Parolo kaj Kanto (1971), Nacia arĥeologia brigado en la trakia urbo Kabile (1979), literaturaj festoj de la originala kaj traduka Esperanta prozo (1985, 1986), Scienc-Praktika Konferenco „Ekologizacio de la agrikulturo en la distrikto de Jambol“ kun internacia partopreno (1985). Estis organizitaj ankaŭ naciaj E-kursoj por instruistoj, regionaj E-renkontiĝoj.

En nia distrikto funkcias 12 E-societoj. En 21 kursoj la Internacian Lingvon lernas 300 gekursanoj. Esperanto penetris inter la junularo. La geesperantistoj en nia distrikto uzas la lingvon por internaciaj amikaj kontaktoj, por kontribui al konservo de la paco en la mondo.

Estis prezentita belarta programo kun partopreno de la poetino Penka Papazova, la operkantistino Galja Kostova kaj Maria Angelova k. a.

Iljana ILIEVA,
Konstantin GEORGIEV

PRI LA PROPRA NOMO DE ZAMENHOFA PLANLINGVO

(Daŭrigo de n-ro 5/1987)

La (tria, plena) ampleksa nomo de la Zamenhofa planlingvo estas Lingvo Internacia „Esperanto“ aŭ Lingvo Internacia Esperanto. Ĝin enkondukis D-ro Zamenhof en septembro 1889. Per tiu nomo komenciĝas la unua frazo de la ĉefartikolo „Prospekto“ en la internacia esperantista presorgano¹⁴. La ampleksa nomo de la Zamenhofa planlingvo — Lingvo Internacia Esperanto — aperas en la titoloj de dekoj da ruslingvaj lernolibroj de D-ro Zamenhof kaj de aliaj ruslingvaj aŭtoroj en la periodo 1892—1916. Iom poste mi mencias ilin detale. La sama nomo frue aperis en la titolo Ekzercaro de Lingvo Internacia „Esperanto“ (1894)¹⁵. La ampleksa nomo Lingvo Internacia Esperanto aperas en la dua eldono de Universala Vortaro de la Lingvo Internacia Esperanto (1898)¹⁶ kaj en ĉiuj sekvaj eldonoj de la sama verko (tria eldono 1901, kvara eldono 1904, en 1906, 1907 k. a.). La ampleksa nomo Lingvo Internacia „Esperanto“ aperis en la Ekzercaro (1894), sed ankaŭ en la Ekzercaro de la Lingvo Internacia „Esperanto“, dua eldono¹⁶, (1898) kaj en ĉiuj sekvaj eldonoj (tria eldono 1900, kvara eldono 1904, ankaŭ en 1906 — du eldonoj, 1910 k. a.). La ampleksa nomo de la Zamenhofa planlingvo staras en la titolo de ĉiuj tri ĉapitroj en la Fundamento de Esperanto (1905)¹⁷: I. Fundamenta Gramatiko de la Lingvo Internacia „Esperanto“ (p. 1), II. Ekzercaro de la Lingvo Internacia „Esperanto“ (p. 31), III. Universala Vortaro de la Lingvo Internacia „Esperanto“ (p. 87). Tiel la ampleksa nomo estas oficialigita per la Fundamento de Esperanto (ekde 1905).

Nacilingve kaj iam ankaŭ paralele en Esperanto la ampleksa nomo de la Zamenhofa planlingvo aperas en la titolo de ruslingvaj lernolibroj en 1892: Zamenhof, L. L.: Lingvo Internacia „Esperanto“. Antaŭparolo kaj Plena lernolibro. 1892, Varsovio¹⁸. La sama — ampleksa nomo de la Zamenhofa planlingvo — aperas en la titoloj de preskaŭ ĉiuj ruslingvaj lernolibroj pri Lingvo Internacia „Esperanto“, verkitaj kaj eldonitaj de D-ro Zamenhof en la jaroj 1893, 1894, 1895, 1899, 1900, 1904, 1909 kaj 1911.

La ampleksa nomo de la Zamenhofa planlingvo — Lingvo Internacia „Esperanto“ — ripetigas ankaŭ en la titoloj de ruslingvaj Esperanto-lernolibroj, verkitaj de aliaj aŭtoroj (Kapitano K. Klimov¹⁹ (1900), Ju. Kolovrat-Cervinskij (1905), A. P. Koltonovskij (1905), T. A. Sĉavinskij (1905, 1910), D-ro D. A. Naumenko (1908), E. B. Radvan-Ripinskij (tri lernolibroj en 1908), L. T. Titov (1908), V. I. Devjatnin (1909, 1910), A. E. Egoŝkij (1909), D-ro N. A. Kabanov (1909), S. Lui (1910), Vardan Sirunjan (1910), A. A. Saĥarov (1913, 1916) k. a.

La ampleksa nomo Lingvo Internacia „Esperanto“ migris tra la tuta mondo per tradukoj de ruslingvaj Esperanto-lernolibroj en alilingvaj eldonoj. Ekzemple, el la bulgaraj E-lernolibroj de la periodo 1895—1910, du estis tradukitaj (1895)²⁰, 1900²¹ kaj la tria estas kompilita laŭ ruslingva kaj aliaj modeloj (1910)²². Tiaj ekzemploj estas multaj. Ili atestas pri la alta ofteco en uzado de la ampleksa nomo de la Zamenhofa planlingvo — Lingvo Internacia „Esperanto“.

Pri la vastigo de la ampleksa nomo de la Zamenhofa planlingvo — Lingvo Internacia Esperanto —

multon kontribuis ankaŭ la diversaj varbaj broŝuroj kaj libroj. Inter ili sur la unua loko firme staras la verko de D-ro Zamenhof: Mallongaj Informoj pri la Lingvo Internacia „Esperanto“ (en rusa lingvo, 1896, okupas N-ro 85 en Nomaro pri l'Verkoj de la Lingvo Internacia Esperanto). Tiu varbilo estis tre efika, tial en daŭro de kvar jaroj (1896—1899) ĝi estis tradukita kaj eldonita en deko da aliaj lingvoj (franca, N-ro 86; pola, 88; germana, 89; sveda, 95; portugala, 96; nederlanda, 97; angla, 98; hispana, 99; itala, 100; bulgara, en du eldonoj, N-roj 126 kaj 131). Krom en apartaj broŝuroj, ĝi estis ofte represata en lernolibroj de Esperanto²³. Sur la dua loko mi deziras mencii la dulingvan inform-libron (en lingvoj rusa kaj Esperanto) de A. A. Saĥarov: Sur la Vojo al Frateco inter la Popoloj²⁴, aperinta en 1907.

La ampleksa nomo de la Zamenhofa planlingvo ne iavas novajn erojn, ĝi konsistas el simpla kunmeto de la nomoj Lingvo Internacia kaj Esperanto (do „Lingvo Internacia Esperanto“). Tiu nomo estas oficialigita en teksto de Fundamento de Esperanto (1905)²⁵ kaj estas uzata ankaŭ nun, sed tre malofte.

Ĉiuj ĉi tri funkciantaj nomoj de la Zamenhofa planlingvo (Esperanto, Lingvo Internacia kaj Lingvo Internacia „Esperanto“) ne nur sufiĉas, sed oni povas diri, ke ili estas en abundo. La vivo montris, ke unu el tiuj nomoj (la nomo Esperanto) dominas preskaŭ absolute en la lingvouzado. La ceteraj du nomoj (Lingvo Internacia kaj Lingvo Internacia „Esperanto“) estas uzataj, sed tre malofte. Ili estas sur vojo fariĝi... arĥaismoj.

Malgraŭ tiu sufiĉo aŭ eĉ superfluo de nomoj por la Zamenhofa planlingvo, aperis eĉ kvara nomo (Internacia Lingvo) por tiu sama planlingvo. La nova (kvara) nomo ne estas io tute nova. Ĝi estas simpla renverso de la jam ekzistanta, ekde la komenco (1887—1888) nomo Lingvo Internacia. Tiun kvaran nomon unue starigis la rusa esperantisto Ivan Sirjaev, kun pseŭdonomo Ivan Malfeliĉulo (1877—1933) en artikolo Unua Libro de Esperanto (1933)²⁶, tamen ĝi apenaŭ estis rimarkita, kvankam post tio aperis (1935) la nova nomo Internacia Lingvo ankaŭ aliloke²⁷.

La kvaran nomon (Internacia Lingvo) oficiale starigis la finnlanda esperantisto D-ro Vilho Setälä (1892—1985). En 1947, okaze de la 60-jara datreveno ekde la apero de Esperanto (1887—1947) li decidis eldoni foto-represe la Unuan Libron por rusoj, de julio 1887. La represajo aperis en 1948.

En la tuta mondo ekzistis nur unu ekzemplero (en Belgio) de la represota lernolibro kaj tiu havis gravajn difektojn. Mankis al ĝi ne nur la kovrililo, sed ankaŭ la paĝoj (1—2, el la korpo de la verko. Tial la eldoninto D-ro Setälä, en Helsinko, desegnis la titolpaĝon — ne en rusa lingvo, sed en Esperanto kaj ne laŭ la traduko (1888) de D-ro Zamenhof (Lingvo Internacia)²⁸, sed laŭ la traduko (1933, de Ivan Sirjaev t. e. kun renversita nomo (Internacia Lingvo).

Ekzistas esperantistaj sciencistoj, kiuj konsideras la nomon Esperanto neoportuna, eĉ malbona precipe por la varbado. Tiu problemo ne estas nova. Similan sperton havis ankaŭ D-ro Zamenhof kaj E. Drenzen. Plejparte pro ĝi la nomo Esperanto ne sukcesis definitive forpuŝi la nomon Lingvo Internacia, kiu, kronologie, estas la unua nomo de la Zamenhofa planlingvo. En siaj informo-varbaj verkoj D-ro Zamenhof

ofte uzadis la nomon Lingvo Internacia. En tiu rilato la plej konsekvenca disĉiplo de D-ro Zamenhof estis la sovetia gvid-esperantisto kaj verkisto Ernesto Drenzen. Eĉ pli, laŭ lia iniciato la nomo Lingvo Internacia estis enskribita en la statuto de Sovetlanda Esperantista Unio (SEU) en 1931²⁹. Multaj aliaj gvidesperantistoj ankaŭ sekvis kaj subtenis la Zamenhofan modelon pri uzo de la nomo Lingvo Internacia. Mi menci la nomojn de Leo Belmont (1865—1941)³⁰, Ar Mor³¹ k. a.

Post la Dua Mondmilito la esperantistaj sciencistoj denove koliziis kun la problemoj pri „sciencia” nomo de la Zamenhofa planlingvo. Parte pro neatentemo, parte pro nebona kono pri la nomoj de la Zamenhofa planlingvo oni serĉis novan solvon per oficiala enkonduko de nova nomo — Internacia Lingvo, anstataŭ subteni kaj uzi la jam ekzistantan „sciencan” nomon — Lingvo Internacia.

Canko MURGIN
(Daŭrigota)

Internacia metodika seminario

La 1-an-7-an de aprilo 1987 en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, okazis V Internacia Metodika Seminario (IMS). Ĝian laboron partoprenis 49 pedagogoj el 6 landoj: Bulgario (36), GDR (1), Hungario (4), Italio (2), Pollando (3) kaj Svedio (3).

Ĉiutage antaŭtagmeze kaj posttagmeze okazis prelegoj ligitaj kun la ĝenerala temo de la seminario: „Instrumetodoj en duagrada kursoj (por progresantoj) je diversaj niveloj (lernantoj, plenaĝuloj). Preletoj jenaj pedagogoj: Irena Szanser (Pollando) — „La instruado kaj preparo de horskizoj”; Petko Arnaudov (Bulgario) — „Problemoj de Esperanto-instruado en duagrada kaj triagrada kursoj; Mariana Elenova (Bulgario) — „Kiel la ĵunularo ŝatus lerni Esperanton; Saša Nedeva (Bulgario) — „Instruado de la prepozicioj „pri, por, pro”; Joachim Werdin (Pollando) — „Sperto kaj rimarkoj lige kun instruado al progresantoj”; Nikola Uzunov (Bulgario) — „Rolo de Esperanto-instruisto en duagrada kaj triagrada kursoj”; Rumjana Janeva (Bulgario) — „Instrusituacioj kiel elementoj de aktivigo”; Zsuzsa Barcay (Hungario) — „La unueco de ekkono, enkapigo, trejnado kaj libera aplikado de la lingva materialo dum unu instruado”; Marin Băcev (Bulgario) — „Pri iuj novaj Esperanto-metodoj” kaj „Pri sugestopedio kiel instrumetodo”; Eva Bojaĝieva (Bulgario) — „Pri akuzativo de direkto”; Boris Marinov (Bulgario) — „El mia sperto pri instruado de Esperanto-gramatiko”; d-ro Till Dahlenburg (GDR) — „Pri unueco de kelkaj procezoj; Olga Cankova (Bulgario) — „La arto de fremdlingva instruado”; Katarina Farago (Hungario) — „Pri instrumetodo en ĝenerala Esperanto-klubo”; Agnes Monus (Hungario) — „Programita lernolibro de Esperanto”; Bojan Lalov (Bulgario) — „La komputilo en la Esperanto-instruado”; Irena Szanser (Pollando) — „La kanzono kiel eduka kaj refreŝiga rimedo”; Kunĉo Vavlev (Bulgario) — „La instruisto de Esperanto”;

Dum la seminario oni esprimis opiniojn kaj sugestojn konekse kun la sekva 6-a Internacia Metodika Seminario, kies temo estu: „La rolo de la instruisto kaj la rolo de la studmaterialo en kursoj por progresantoj”.

Dum la liberaj vesperaj horoj Irena Szanser konatigis la seminarianojn kun vidindaĵoj pri Zamenhof en Varsovio. Zsuzsa Barcay prezentis per videokasedo filmon pri Hungario — pri iuj hungaraj metioj kaj pri la publika kaj hejma vivo en Hungario.

Marin BĂCEV,
metodikisto ĉe BEA

Kursoj por instruistoj

La tradiciaj Naciaj Esperanto-Kursoj por Instruistoj ĉi-jare okazis en Jambol. La vintraj — de la 16-a ĝis la 25-a de januaro, kaj la printempaj — de la 1-a ĝis la 9-a de aprilo. La organizantoj — fako „Instruagado kaj kvalifiko” ĉe CE de BEA, kunlabore kun DE de BEA — Jambol, strebis krei laŭeble plej favorajn kondiĉojn por garantii sukcesan laboron de la kursoj. Nun ni povas diri, ke la rezultoj estas kontentigaj.

En januaro partoprenis 78 gekursanoj, el kiuj sukcese ekzamenigis 26; en aprilo — 48, sukcese ekzamenigis 31. Kursgvidantoj en la unuagrada kurso estis Liljana Paraŝkevova, Bistra Dojĉinova (rekonita lektoro) kaj Ĥristina Nikolova; kaj en la duagrada kurso — Slavjanka Kapeva kaj Maria Pejкова; en la triagrada kurso instruis Fani Mihajlova (rekonita lektoro) kaj Violin Oljanov (elstara lektoro).

Car la tempodaŭro de la kursoj ne estis sufiĉe longa, necesis anticipi prepariĝo flanke de la kursanoj. La plejparto el ili plenumis tiun ĉi taskon, kio faciligis la laboron de la lektoroj kaj ebligis kontentigajn rezultojn. Dum la instruoproceso estis uzataj variaj didaktikaj lingvaj ludoj, diversaj instruhelpiloj. Regis bona etoso, al kiu kontribuis ankaŭ la situantaj tute proksime unu de la alia lernoĉambroj, loĝejoj kaj manĝejoj.

La reprezentantoj de fako „Instruagado kaj kvalifiko” ĉe CE de BEA Nedka Valjaviĉarska — gvidanto de la fako, kaj Marin Băcev — metodikisto, vizitis la kursojn kaj ĉeestis lecionojn de ĉiuj kursgvidantoj. Dum la disputoj, kiuj sekvis post ĉiu vizito de leciono, ili esprimis sian opinion pri la laboro de la lektoroj kaj faris rekomendojn por plibonigo de la instruado.

Laŭ iniciato de la instrufako efektiviĝis publikaj lecionoj en la vintraj kaj en la printempaj kursoj, en kiuj oni uzis diversajn instruhelpilojn — foliojn por kompletigo de frazoj, ludilojn, kantojn.

Car la kursoj ĉiujare okazos en diversaj urboj, publikaj lecionoj estos bona formo por perfektigo.

La Naciaj E-kursoj por Instruistoj pasis sukcese. Al tio kontribuis la bona organizado, la bonaj laborokondiĉoj — pri kio ni devas danki al DE de BEA — Jambol, kaj speciale al ties prezidanto B. Iliev kaj la vicprezidanto D. Ĥristov.

Nedka VALJAVIĈARSKA

OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Sendependa lingvo-instituto fondita de D-ro L. L. Zamenhof en 1905)

Post studo kaj propono de la Gramatika Sekcio la Akademio voĉdone akceptis jenan rezolucion:

1. Post ita/ata/ota- vorto, la aganto estas indikita per DE. Ekz. ŝi estas amata de ĉiuj (6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko).
2. Post o-vortoj, DE povas indiki la aganton, se neniu alia koncernanto estas ebla. Ekz., la kanto de la

birdoj, la projekto de la inĝenieroj (Fundamento), la parolado de la oratoro, k. s.

3. Por indiki la aganton post o-vortoj en aliaj kazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas FARE DE. Ekz. la akcepto de la kongresanoj fare de Zamenhof; la traduko de Hamleto fare de Zamenhof.

La Direktoro de la
Sekcio pri Gramatiko
Michel Duc Goninaz

La prezidanto,
D-ro A. Albault
(21 rue de Verfeil,
F-32100 Toulouse, Francio)

FRUKTODONA NACIA KONFERENCO EN LEIPZIG

Laŭ komisiio de la Centra Estraro de BEA mi havis la honoran taskon reprezenti nian asocion en la IV Nacia Konferenco de delegitoj de la Esperanto-Asocio ĉe Kulturligo de GDR, kiu okazis en Leipzig, de la 3-a ĝis la 5-a de aprilo j. k. Kaj jen, mi denove estas en Leipzig post dudek jaroj. Mi trovis ĝin plibeliginta, renovigita, sed ĉiam konservanta tiun ĉarman romantikan etoson, kiun mi memoras de la pasintaj jaroj. . .

La solena inaŭguro de la konferenco okazis la 4-an de aprilo matene, en la junulara klubo „Amikeco inter la popoloj“ (en unu el la novaj urbaj loĝkvartaloj), en ĉesto de pli ol 200 delegitoj kaj gastoj.

Post la enkonduka parolado de d-ro Detlev Blanke, sekretario de GDREA, salutparolis kaj bondeziris fruktodonan laboron al la delegitoj reprezentantoj de la E-asocioj el la socialismaj landoj: Donĉo Hitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, kiu en la nomo de BEA donacis al la Estraro de GDREA jubilean metaloplastikan bildon de d-ro Zamenhof; Margit Turkova, vicprezidantino de Ĉeĥa MEM-Sekcio; Zsolt Gyarmathy el Hungario; Antoni Golonka, vicprezidanto de Pola E-Asocio; Anton Zahariaŝ el Slovakio; Ivan Andronov el Sovetunio. Honoraj gastoj de la konferenco estis ankaŭ Gerhardt Meriting, membro de la Prezidio de la Kulturligo de GDR, prof. d-ro Peter Heldt, prezidanto de la Kulturligo en Leipzig, d-ro Rudolf Fiedler, sekretario de DE de LK en Leipzig.

En sia raporto antaŭ la delegitoj Hans Heinel, prezidanto de Esperanto-Asocio de GDR, priskribis la ĝisnunan agadon de GDREA kaj substrekis, ke ĝi estis estimata partnero de ĉiuj sociopolitikaj organizaĵoj en la lando kaj ludas gravan rolon por firmigo de la socialisma demokratio en GDR. La pritaksoj pri la agado de GDREA en kadre de la Kulturligo estas pozitivaj kaj favoraj. La esperantistoj en GDR (kies nombro estas ĉirkaŭ 1700 oficiale registritaj membroj) estas en la unuaj vicoj de la pacdefendantoj kaj multe kontribuas por kunlaborado kaj interkomprenigo kun aliaj landoj. La membraro de GDREA estas relative juniginta, akirinta novajn freŝajn fortojn. GDREA ricevas financon helpon de la Kulturligo, ĝuas malavaran donacemon de apartaj esperantistoj, agnoskon kaj helpon flanko de aliaj soci-kulturaj organizaĵoj kaj institucioj en GDR. Ĉiujare en diversaj eldonoj en GDR aperas ĉirkaŭ 300 artikoloj kaj materialoj pri la agado de la Asocio. La 13-an kaj la 14-an de aprilo j. k. la dua programo de la Televido de GDR elsendis raportaĵojn pri Esperanto kaj pri la aktivado de

GDREA, unu el kiuj ni ankaŭ povis spekti dum la konferenco.

Krom la oficiala organo de GDREA „Der Esperantist“, en GDR estas eldonataj ankaŭ revuo „Paco“ (versio germanlingva), la bulteno „Saksa Kuriero“ (en Leipzig, redaktoro Joachim Schulze) kaj la bulteno „Novajoj el Halle“ (redaktoro ing. Hans-Peter Bartos).

La delegitoj kaj gastoj aktivadis en kvar laborgrupoj: 1) Publika informado (gvidata de J. Schulze); 2. „Interlingvistiko kaj Esperantologio“ (gvidanto d-ro D. Blanke); 3. „Scienca aplikado de Esperanto“, (gvidanto — Michael Behr); 4. „Intensigo de E-instruado“ (gvidanto Achim Zettler).

Mia juna kolego Evgeni Georgiev, reprezentanto de BEJ, kaj mi partoprenis la laboron de la komisiio pri publika informado. Laŭ peto de J. Schulze mi rakontis pri la laboro en la redakcio de „Bulgara Esperantisto“, pri TEJA kaj ILEF, kio vekis grandan intereson.

Dum la paŭzoj ni sukcesis persone kontaktigi kun veteranoj kaj elstaraj agantoj de la Esperanto-movado en GDR kiel Ino Kolbe, Paul Köster, Oskar Stolberg, Fritz Wollenberg, k. a.

Tre interesa kaj utila estis la renkontigo de la eksterlandaj gastoj kun esperantistoj-aktivuloj el Leipzig. Ni ĝoje povas diri, ke ni jam havas novajn amikojn-esperantistojn en GDR!

Dum la liberaj horoj ni promenis tra la urbo vizitis la muzeon „Georgi Dimitrov“ kaj aŭskultis la voĉon de la granda filo de Bulgario, lian brilan apoloĝion kontraŭ la monstroj akuzoj de la hitleranoj pri bruligo de la Parlamentejo (Reichstag) en 1933. Emocia estis ankaŭ la vizito de la preĝejo Thomaskirche, en kiu dum pluraj jaroj laboris kiel organisto la fama germana komponisto Johann Sebastian Bach. En la altaro de la preĝejo troviĝas lia tombo.

— — — —

La plenkunsido de la konferenco reelektis Hans Heinel kiel prezidanton kaj d-ro Detlev Blanke — kiel sekretario de GDREA por la nova mandato.

Ni kore dankas niajn dommastrojn pro iliaj zorgemo kaj korvarmaj rilatoj al ni dum nia utila partopreno en la IV Konferenco de la Esperantistoj en GDR.

Leipzig — Sofio,
aprilo, 1987

Donĉo HITROV

„MIA VIVO“ EN VJETNAMA LINGVO

Sub titolo „La venkinto de sia destino“ la romaniĝita aŭtobiografio „Mia vivo“ de Trifon Hristovski aperos en la vjetnama, laŭ la plano de la eldonejo „Juneco“, fine de 1987. La tradukon faris Dao Anh Kha kaj Dang Dinh Dam, laŭ la Esperanto-versio de Nikola Aleksiev (1981), kaj konsulte al la franca versio de R. Deprez, A. Heuscher kaj C. Tholet (1985). Kiel projektite de la eldonanto, tiu-ĉi vjetnama versio aperos en du paralelaj formoj — krom la ordinara, en sufiĉe granda eldonkvanto, ankaŭ unu luksa eldono kun ilustraĵoj de la esperantisto-desegnisto Hong Hac.

En sia Enkonduko, adresita precipe al la junaj legantoj, la konata poeto Dao Anh Kha i.a. skribis: „Se „Tiel hardiĝis la ŝtato“ de N. Ostrovskij, dum la

pasintaj jardekoj de nia Rezistado kontraŭ la francaj kaj usonaj agresmilitoj, estis unu el la preferataj legaĵoj de nia tutlanda junularo, nun, kiam nia Partio alvokas la novan generacion al sukcesa laboro sur la scienc-teknika kaj kultura terenoj, venas al ni la aŭtobiografia verko de Trifon Hristovski. Jen nova spirita nutraĵo, kiu povus duobligi por la juneca animo kaj la forton kaj la kuraĝon laŭ la kruda vojo al novaj atingoj kronontaj ĉies patriotismon kaj socialisman internaciismon“.

La renoma eldonejo „Juneco“ gvidata de la Vjetnama Komunisma Junularo „Ho-Si-Min“ prezentos al sia publiko verkon, kiu sendube vekos grandan intereson.

Thanh HUONG

GU VI KONIS VLADIMIR GORAZEJEV?

Karaj samideanoj,

Skribas al vi Liljana Stojanova el Veliko Târnovo. Depost du jaroj mi korespondas kun la soveĝa esperantisto Aleksandr Sadim. Dank' al liaj interesaj leteroj mi multe eksciis pri la malproksima regiono de urbo Magadan, kie loĝas mia korespondanto. La lokaj esperantistoj volas kompili historion de la E-movado en sia urbo. Ili serĉas dokumentojn, leterojn, ktp. Mi opinias, ke se la redakcio publikigos fragmentojn el la lasta letero de Aleksandr Sadim (laŭ lia peto!), tio multe helpos ilian laboron.

„Vladimir Ivanoviĉ Gorazejev estas unu el la sovetiaj veteranoj-esperantistoj — de 1927. Li loĝis kaj laboris en Magadano kaj forpasis tie en 1972 aŭ 1973. Maljuna poŝtistino rememoras, ke antaŭ 16 jaroj la plej pezaj sakoj estis por la regiono, kie vivis Vladimir Ivanoviĉ. Al li ŝi ĉiutage alportis dekojn de sendaĵoj. Sur la leteroj kaj banderoj buntis poŝtmarkoj de diversaj landoj: Nov-Zelando, Groenlando, Liĥtenŝtejno, Japanio, Kanado, Argentino. .“

Dum pli ol 30 jaroj de sia vivo en Magadano Gorazejev laboris por alkutimigi al nia severa klimato, al la eterne glaciokovrita tero multajn varmamajn vegetaĵojn. Sur sia negranda eksperimenta parcelo li kulturis rabarbon kaj fragojn, multajn specojn de ribujo, frambujo, grosujo kaj delikatajn, dume ne fruktodonajn pomujetojn. Kaj florojn! Rozkolora akvilegio el Svedio, kamomilo, oreta senecio, violo el Italio. .

Liaj eksperimentoj havis striktan sciencan bazon. Li interesiĝis pri ĉio, multe legis kaj korespondis kun multaj solidaj sovetiaj kaj eksterlandaj natursciencaj institutoj, kun scienculoj-botanikistoj, kun naturamantoj. Vladimir Ivanoviĉ interŝanĝis kun siaj korespondantoj semojn, konsilojn, sperton. En tiu ĉi sfero tre helpis al li la scio de Esperanto.

En la lastaj jaroj de sia vivo Vladimir Ivanoviĉ donacis sian parcelon al la urbo kaj restis kiel ĉefa zorganto kaj ĝardenisto sen salajro.

Multaj jaroj pasis de tiu tempo. La revoj de Vladimir Ivanoviĉ Gorazejev realiĝis. Nun en Magadano estas Agrikultura Scienc-Esplora Instituto. Ne malaperis en la urbo ankaŭ la esperantistoj — en Magadano laboras Magadana Centra Esperanto-Klubo „Norda Stelaro“ — unu el la plej aktivaj E-klubo de la lando. Viciprezidanto de la klubo estas la filo de V. I. Gorazejev — Nikolaj Vladimiroviĉ Gorazejev, kiu esperantistigis nur en 1982. Bedaŭrinde, ĝis tiu tempo li perdis multajn materialojn de sia patro. Verŝajne estas esperantistoj-veteranoj, kiuj konis kaj memoras Vladimir Ivanoviĉ GORAZEJEV (kies adreso estis: Soveta Unio, Magadano, p. k. 23, Eksperimenta parcelo), kaj ankaŭ aliajn esperantistojn, kiuj loĝis kaj laboris tiam en Magadano kaj Magadana regiono.

Por ni tre valoros ĉiuj rememoroj pri magadanaj esperantistoj, iliaj malnovaj adresoj, iliaj leteroj kaj fotoj (kvankam kopioj), ktp. Al ĉiuj skribintoj ni nepre respondos. La adreso de nia klubo estas: p. k. 940, Magadano-14, SU-685014, Sovetunio.

EN SOFIO

La semajna gazeto „Anteni“ (25. II. 1987) aperigis sur tri kolumnoj artikolon pri Trifon Hristovski kaj tradukon de lia letero, presita en la Esperanta gazeto „Popola Fronto“, eldonata en batalanta Hispanio (la numero de 15. VII. 1937): En la semajna gazeto „Impuls“, eldono de la poŝta administracio, trovis lokon la artikolo de Georgi Kirov el u. V. Târnovo pri Esperanto kaj filatelo; En la monata organo de la Asocio de Bulgaraj Ĵurnalistoj „Balgarski Ĵurnalist“ aperis rememoroj de la konata veterana ĵurnalistoj kaj sociaganto Dimităr Bratanov, en kiu li mencias ankaŭ pri la antifaŝista batalo de bulgaraj esperantistoj.

EN LA LANDO:

Ĵurnalo „Novo Ludogorie“ — u. Razgrad (5. III. 1987) publikigis trikolumnan skizon de Dulinko Dulev pri la loka esperantista veterano Petăr Kolev; En j. „Šumenska Zarja“ — u. Sumen (10. III. 1987) aperis artikolo pri la fruktodona korespondado de la loka aktivulo Cvjatko Todorov kun nederlandaj amikoj. La artikolon verkis Slavĉo Vasilev; j. „Naroden Drugar“ — u. Jambol (26. III. 1987) disponigis preskaŭ tutan paĝon al Esperanto. La paĝo enhavas: artikolon pri la centjara jubileo de Boris Iliev, prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA; artikolon pri instruado de Esperanto en la distrikto fare de Dimităr Hristov; artikolon pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto de d-rino Jordanka Popova; versaĵon „Esperanto“ de Penka Papazova; informon pri antaŭstaranta jubilea arango. En la studenta gazeto „Dunavski Student“ — u. Sviŝtov (21. III. 1987) prof. Hristo Marinov skribas pri fakultativa instruado de Esperanto en la loka altlernejo pri financo kaj ekonomiko.

LITERATURAJ FESTOJ DE ORIGINALA KAJ TRADUKA E-PROZO „JAMBOL'87“

La 18-an de aprilo j. k. en Jambol estis anoncigitaj la rezultoj de la literatura konkurso por originala kaj traduka E-prozo „Jambol'87“, dediĉita al la 100-jariĝo de Esperanto kaj la 80-jariĝo de BEA. Temo de la konkurso estas „Esperanto — fenestro al la mondo“.

Georgi Miĥalkov — prezidanto de la ĵurio, anoncis la premiojn:

Por originala rakonto

- I premio — Nevena Nedelĉeva el Sofio
- II premio — Marin Băcev el Sofio
- III premio — Ilija Ivanov el Loveĉ

Por tradukita rakonto

- I premio — ne estas aljuĝita
- II premio — Veska Peeva el Sumen
- III premio — Stojanka Dragneva el Sliven
- III premio — Ĉudomir Kantargiev el Sliven
- Kuraĝiga premio — Ilija Andreev el Sumen

Post la oficiala parto estis prezentita riĉa literatura-muzika programo.

Hiana ILIEVA



LA LEGANTOJ APROBAS

Estimata Redakcio,

Gratulinda estas la letero-alvoko de la Turista Sekcio ĉe BEA (BE, 2/87), direktita al la Esperanto-societoj lige kun la nomado de objektoj per la nomoj „Esperanto” kaj „D-ro Zamenhof”. Same gratulinda estas la nova rubriko „La legantoj proponas”.

Jen tri stratoj en la distrikto de Ruse, nomitaj antaŭ kelke da jaroj: strato „Zamenhof” en urbo Dve

Mogili, strato „Esperanto” en urbo Borovo kaj strato „Esperanto” en vilaĝo Štárklevo — ĉiuj centroj de komunumoj. Krome, en Ruse depost 1966 estas strato „Esperanto”, ne placo „Zamenhof”, kiel oni povas legi en „BE”, 2/1987, sub n-ro 25 en la nomaro.

Lastatempe ni klopodas nomi la regionajn poliklinikojn en Dve Mogili kaj vilaĝo Slivo Pole, kaj ankaŭ stratojn en aliaj vilaĝoj en la distrikto, per la nomo „D-ro Zamenhof”.

Jordan KALINOV

KUN NOMO „ESPERANTO”

En n-ro 2/87 de „BE” estas aperigita fragmento de la tabelo de s-no Hugo Röllinger, kiu rilatas la nomitajn en Bulgario objektojn „Zamenhof” kaj „Esperanto”.

Lige kun tio mi atentigas, ke ekde 1967 en la somer-restadejo Slančev Brjag (Suna Bordo) ekzistas restoracio nomita „Esperanto” (laŭ propono de samideano Nikola Stranganski — prezidanto de la loka E-societo „Turisto”).

D-ro Asen ASTROV

NOVA PERIODAĴO

Aperis n-ro 1/1987 de „FOKUSO” — nova kvaron-jara periodaĵo el Hungario. Ĝi estas daŭrigo de revuo „Internacia Komputado”. Gardante la sukcesajn tradiciojn de sia antaŭanto, estonte ĝi donos lokon ankaŭ al novaj aktualaj temoj.

Plej ampleksa estos la rubriko pri komputado, sed oni publikigos ankaŭ artikolojn pri ekonomiko, edukado kaj sociaj sciencoj, materialojn pri gravaj atingoj de la moderna naturscienco.

En 1987 „FOKUSO” havos pli multe da paĝoj ol „Internacia Komputado”, sed la prezo restos la sama, kiel tiu de ĝia antaŭanto.

„FOKUSO” havas la noblan celon fariĝi magazino de la moderna homo. Ĝi klopodos prezenti la diversajn temojn en interesa formo kaj per facile legebla stilo. Tiu ĉi celo estas realigebla nur helpe de la legantoj. Tial la redakcianoj atendas ricevi kontribuojn pri la ĉi-supre menciitaj temoj. Adreso de la redakcio de „FOKUSO” Komputista Grupo de HEA, H-1368 Budapest, pf. 193, Hungario.

„FOKUSO” estas abonebla dum la tuta jaro. Bulgaroj bovolu turni sin al: Todor DIMITROV, BG-5000, VELIKO TÄRNOVO N, str. Pikolo 11, tel. 22-347 (hejma) kaj 2651/227 (ofica). Abonkoto: 8 levoj.

Evgeni GEORGIEV

FERIADO EN MIEDZYGÓRZE

La Vroclava Filio de Pola Esperanto-Asocio proponas al vi aĝrablan ripozon kaj multajn amikajn kontaktojn kun diverslandaj esperantistoj. En 1987 estas du feriskipoj, ĉiu por 480 partoprenantoj: 6-a Internacia Feriado „Esperanto hejme”, kiu okazos de la 2-a ĝis la 15-a de aŭgusto 1987 kaj 23-a Internacia Esperantista Feriado „Ora pola aŭtuno”, de la 2-a ĝis la 15-a de septembro 1987.

La pitoreska ripozloko Miedzygórze situas en Sude-ty-montaro, 130 km sude de la regiona urbo Wrocław. Enloĝigo kaj programo en alpestilaj ripozdomoj. Arkovritaj montoj kaj kvietaj idiliaj valoj, tra kiuj fluas kristalkvaj torrentoj, abundo da vojetoj kaŭzas, ke Miedzygórze estas vera paradizo por pasiaj natur-amikoj.

Programo: Diversgradaj konversaciaj kursoj, fundamenta kurso laŭ „Cseh-metodo”, esperantologia se-

minario, kultura kaj distra programo en Esperanto, lumbildprelegoj, kantvesperoj, dancado, maskobalo, ĝofajro, montaraj piedekskursoj, aŭtoĉaraj ekskursoj k. a. Enkadre de ambaŭ feriskipoj okazos tradicia renkontigo de esperantistaj familioj. En la feriskipo „Esperanto hejme” estas antaŭvidita riĉa amuza programo por infanoj kaj junularo kaj Cseh-seminario por instruistoj.

Kiel atingi Miedzygórze? De Wrocław — la ĉefurbo de Malsupra Silezio, oni devas veni per trajno al la urbo Bystrzyca Kłodzka (112 km suden) kaj de tie al Miedzygórze trafikas multaj aŭtobusoj (15 km). Ĝis la ripozdomoj mem kondukas bona asfaltita ŝoseo. Bystrzyca Kłodzka posedas senperan trajnan ligon kun Praha.

Partoprenkoto por dusemajna restado: 190 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro en alia valuto. Prezoj por civitanoj de socialismaj landoj estos difinitaj en aprilo. Petu apartan informilon. La partoprenkoto ampleksas dormlokon en 2,3 aŭ 4-lita ĉambro, 3-fojan manĝadon ĉiutage, partoprenon enkursoj, seminarioj kaj distraj aranĝoj. Aŭtobusaj ekskursoj estas pageblaj aparte surloke en Miedzygórze. Por infanoj ĝis 7-jaraj kiuj ne okupas apartan liton, oni povas pagi nur manĝokostojn, surloke post la alveno.

Aligilojn oni devas sendi al adreso: Pola Esperanto-Asocio, P. O. koto 16, PL 50-952 Wrocław 17, Pollando. Ĝis la 1-a de junio oni devas ĝiri la partoprenkonton al deviza konto:

Narodowy Bank Polski (Pola Nacia Banko)

Główny Oddział Walutowo-Dewizowy (Ĉefa Valuta-Deziva Fako) PL 00-950 Warszawa.

Konto: Pola Esperanto-Asocio n-ro 1111 — 243247-151-6787. Se eblas, sendu al ni kserokopion de la kvitanco.

„BAKAGICI'87”

La 14-an kaj 15-an de marto ĉi-jare okazis la tradicia regiona renkontigo „Bakagici'87”. Ĉi-foje ĝi estis dediĉita al la 100-jariĝo de Esperanto. Ceestis esperantistoj-turistoj el Stara Zagora, Burgas, Sliven, Kotel, Nesebăr, Karnobat, Ajtos kaj Jambol.

La gastojn salutis Dimităr Hristov — vicprezidanto de DE de BEA — Jambol. Estis prezentita interesa artprogramo.

Iljana ILIEVA



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Lernantoj-komencantoj dez. kor. kun ĉi pri ĉi. Komuna adreso: 6343 Mineralni bani, distr. Haskovo, Ekonomia teknikumo, E-grupo.

Junaj esperantistoj dez. kor. kun ĉi pri ĉi. Komuna adreso: 6300 Haskovo, str. „Otec Paisij“ 23, E-kurso.

EMILIA IVANOVA (19-jara studentino) — 9700 Sumen; ul. Odrin 9, bl. 2, vĥ. A, ap. 16, et. 6 — kolektas fotojn de sportistoj kaj artistoj.

FINNLANDO

TAPANI LAPPALAINEN, (29-jara fraŭlo) — Kivalakotikylä, SF-37500 Lempäälä, — interesiĝas pri muziko, filatelo, lingvoj, sporto, PM, BK k.a., serĉas kontaktojn kun 18—27-jaraj junulinoj.

HUNGARIO

BALÁZS MAJOR (28-jara) nova esperantisto — PAKS, Kornis u. 10, H — 7030, dez. kor. kun bulgaraj familioj pri BK, PM; interŝ. esperantaĵojn kaj insignojn, eventuala gastado.

POLLANDO

DANUTA KOTOWICZ (18-jara) — ul. Poremby 57, 44-213 Rybnik 14 — pri lingvoj, muziko, literaturo, geografio kaj turismo.

BOZENA KLUBA (24-jara) — 14-100 Ostróda, PL. Tysiaclecia P. P. 10. VI./2 — kun ĉi., pri ĉi.

DOROTA MACZKA (23-jara laboristino) — ul. Tynarska 08-110 Siedlce — kun ĉi. pri turismo, literaturo, historio, BK kaj prospektoj.

JAN ARENDARAYK (32-jara laboristo) — Plac Wolności 13/3, 58-420 Lubawka — kun ĉi pri ĉi.

DOROTA PAKOSZ (18-jara) — ul. Dworcowa 49, 47-217 Raszowa k/Kola woj: opolskie — kun ĉi pri ĉi.

MARIA ZIETEK (27-jara fraŭlino, laboristino) — 05-800 Pruzszków, ul. Chopina 25 m 5 — kun ĉi pri turismo kaj lingvoj.

SOVETUNIO

LAIMA SUTKUTE (20-jara studentino pri muziko) — SU 235800; Litovio; Klaipėda; S. Nėrėš 4 — pri muziko, angla lingvo, Esperanto, literaturo, vojaĝoj, BK.

KOVNATORS NAUMO (26-jara, E-instruisto) — 226730, Latva SSR, Aluksne, Omskas, str. 16—2 — kun ĉi pri ĉi, kolektas BK, turismajn prospektojn, esperantaĵojn kaj glumarkojn, sapojn.

ENHAVO

II Bonvenon al la lulilo de nia lingvo (Stanislaw Swistak)

1 La eterna kverko (Hristo Gorov)

2 „Esperanto posedas multajn valorojn...“ (Andrzej Pettyn)

3 La agado de bulgaraj esperantistoj 1929-1936 (Nikola Aleksiev)

4 BEA dum la periodo 1944—1960 (Georgi Dolapčiev)

6 Heroldo de noblaj ideoj (Olga Cankova)

8 Ponto inter generacioj (Marjana Zlatanova)

9 Kun amo kaj fervoro... (Dimo Trudoljubov)

10 La 80-jara bulgara E-poezio (Georgi Miĥalkov)

11 Henri Barbusse kaj Esperanto (Bojana Prodanova)

12 Pri la propra nomo de Zamenhofa planlingvo (Canko Murgin)

14 Fruktodona nacia konferenco en Leipzig

15 Tra la gazetaro

IV Bulgaraj kaj svedaj infanoj kune lernas Esperanton (Petranka Milanova)

Sur la unua kovrilpaĝo:

Jubilea aŭŝo „BEA 80-jara“ pentrita de Maja Ĵekova

ANDREJ TETERVAK (29-jara, juristo) — SU 610021 Kirov, str. Mendeleeva 28—13 — kun ĉi pri ĉi. BRUJAKA ANATOLIJ (30-jara) — ul. Lvovskaja 63 kv. 84 Luck — 263018 — kun ĉi pri ĉi, kolektas BK.

ALEKSANDR VOLOŠIN (25-jara pentristo) — SE — 263018, Ukrainio Volinskaja obl. Luck ul. Lvovskaja 63—2, — pri arto, muziko, literaturo, fotado, kulturo.

GENADIJ MOTČEV — 3268—66, s. Novokairj Bereslavskij rajon, Hersonskaja obl. — serĉas kontaktojn kun ĝelernantoj, kiuj interesiĝas pri rusa lingvo kaj helpus al li organizi ekspozicion je temo „Rusaturka milito de 1877—1878, doninta liberon al Bulgario“

VIKTOR BORISOV (25-jara fraŭlo) — SU 662800 Krasnojarskij kr. G. Mimusinsk — ul. Lenina 157 — pri radiotekniko, radiosporto, BK.

EVGENIJ VIKTOROVIČ USTJANCEV (33-jara) — 431460 MASSR, Ruzaevka, ul. Pionerskaja 125-A-2 — kun ĉi pri muziko, sporto, literaturo. Kolektas PM, BK kaj kalendaretojn.

ATENTON!

La Redakcio de „BE“ pardonpetas k-don Evgeni Georgiev — aŭtoro de la artikolo „La korekta uzo de „kva-zaŭ“. publikigita en n-ro 51987, pro ellaso de lia nomo.

Ĉefredaktoro: Donĉo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ČALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

815N



BULGARAJ KAJ SVEDAJ INFANOJ KUNE LERNIS ESPERANTON

La 30-an de marto nian landon alvenis grupo da gelernantoj el urbo Kungsbacka, Svedio — gaste al la gelernantoj el VII klaso de la Nacia Mezlernejo pri Kulturo — Sofio, kiuj lernas Esperanton. Gvidantinoj de la sveda grupo estis Marta Andreasson, elstara aktivulino de la monda kaj sveda E-movado kaj Inge — Zill Tyrefelt, instruistino de angla kaj germana lingvoj, aktivulino de la internacia virina pacmovado.

La svedaj gelernantoj pasigis neforgeseblajn tagojn kun siaj bulgaraj geamikoj, kun kiuj ili korespondis dum du jaroj. La programo estis varia kaj ili havis eblecon ĝui naturajn vidindaĵojn, kulturajn kaj historiajn monumentojn en nia lando. Kune kun la bulgaraj gelernantoj ili trarigardis la malnovan urboparton de Plovdiv, ekspoziciojn el verkoj de la eminenta bulgara pentristo Zlatju Bojaĝiev, vizitis la Monaĥejon de Baĉkovo. Ok tagojn ili lernis Esperanton en la Internacia E-Kursejo en Pisanica kaj konatiĝis kun la bulgara naturo. Ili ekskursis al la kavernoj „Ulhovica“, „Diabla gorĝo“ kaj „Jagodinska“, admiris la belegan lokon „Cudnite mostove“ (Mirindaj pontoj), trarigardis la vintran ferikomplekson Pamporovo. Per lifto ili atingis montopinton „Snejanka“, ĉeestis koncerton de gelernantoj en la Muzika Lernejo en vilaĝo Siroka Lâka kaj konatiĝis kun la bulgaraj popolinstrumentoj. Ili promenis en urbo Smolajn, kie vizitis la Junpioniran Doman, la Planedarion, la Etnografian Muzeon kaj la Pentroartan Galerion.

Vizitinte la monumenton „Standardo de la paco“ en Sofio, grandega estis la ĝojo de la svedaj geknaboj trovi sonorilon el Svedio inter la multaj aliaj el preskaŭ ĉiuj anguloj de la terĝlobo.

En la Nacia Mezlernejo pri Kulturo okazis renkontiĝo de la gvidantinoj de la sveda grupo kun la direktorino Janka Koleva kaj la vicdirektoroj Emil Hristov kaj Spaska Josifova. La svedaj gastoj spektis filmon dediĉitan al la 10-jara jubileo de la Nacia Mezlernejo pri Kulturo kaj ricevis donacojn de siaj bulgaraj geamikoj. Ili subskribis komunan dokumenton — en Esperanto, angla, franca kaj rusa lingvoj, kun jena teksto;

„Ni volas vivi!

Gelernantoj kaj studentoj el ĉiuj landoj, ni unuigu kontraŭ la nukleaj armiloj! Unuigitaj, ni estos fortaj! Ni kredis je la estonteco! Ni skribu al niaj registaroj, ke ni deziras vivi en paco!“

Tiun ĉi dokumenton ili intencas sendi al gelernantoj kaj studentoj el ĉiuj landoj.

Dekunu tagojn la svedaj kaj bulgaraj gelernantoj ekskursis, konversaciis, kantis kaj dancis kune. Tial neniu miris vidante larmojn en iliaj okuloj ĉe la disiĝo!

ankoraŭfoje Esperanto pruvis sian taŭgecon esti ilo por proksimiĝo kaj amikiĝo de homoj el diversaj nacioj!

Petranka MILANOVA

INTERPAROLO KUN MARTA ANDREASSON

— *Kian postenon vi okupas en la sveda Esperantomovado?*

— Mi estas vicprezidantino de la estraro de SEF, Akomitato de UEA; prezidantino de la Esperantoklubo de Kungälv kaj ankaŭ de la Esperanto-aliano de Gotenborgo; direkciaro de Sveda Esperanto-Instituto.

— *Kiam vi esperantistigis?*

— Jam 20 jarojn mi instruas Esperanton al komencantoj kaj al progresintoj en vesperaj studrondoj. Estas malfacile starigi unuecajn grupojn, mankas dezirantoj.

— *Kiajn instrumaterialojn vi uzas: bildoj, filmoj, ktp?*

— Mi uzas diversajn lernolibrojn: „Esperanto laŭ metodo Friis“, „Jen mia mondo“, „Aŭdvida kurso“ de T. Sekelj k. a. Krome mi uzas diafilmojn, aŭdiŝojn, objektojn k. a.

Ni preparas kursojn por radio kaj ankaŭ por televido. En la Instituto ni pridiskutas enkondukon de videokursoj.

PERMILLA KAJ CAROLINE — du svedaj lernantinoj, konfesas: „Al ni tre plaĉis Bulgario! La naturo estas beleaga kaj la homoj — tre agrablaj.“

La Internacia E-kursejo estas bone aranĝita, sed la manĝaĵo estas iom alispeca ol en Svedio.

Ni komencis lerni Esperanton, ĉar ni povas per ĝi konatiĝi kun novaj geamikoj. Ni kredas, ke Esperanto fariĝos monda lingvo!“

Intervjuis: Petranka MILANOVA